

ĈINIO



Quinn Kelly

12

1995

ISSN 0032-4361

- FESTO POR LA VIRINOJ
- ESPERANTISTINOJ EN NRO-FORUMO
- 90 JAROJ DE ĈINAJ FILMOJ



Sur burĝono

Foto de LI YUWEI

INTER NI

I

Kiam niaj legantoj ricevas tiun ĉi numeron, baldaŭ forpasos la jaro 1995. Ni kredas, ke nia revuo donis al ili ian helpon dum tiu ĉi jaro.

Ĉi-jare la revuo raportis la disvolviĝon de ekonomio, scienco, medicino kaj sporto en Ĉinio, konigis naciminoritatojn de Ĉinio, ĝiajn socian vivon, tradician kulturon kaj lingvon kaj informis pri internaciaj eventoj, kiaj la 50-jariĝo de la venko en la monda kontraŭfaŝisma milito kaj la 50-jariĝo de la fondiĝo de UN. Nemalmultaj artikoloj de la revuo estis skribitaj laŭ propono de niaj legantoj. Ni esperas, ke ili helpas la legantojn pli multe koni Ĉinion. Kompreneble, ni ne estas tute kontentaj pri nia laboro. Pro limigo de la paĝoj tio, kion niaj legantoj deziris, estis ne aŭ

ne sufiĉe raportata. Sed tamen ni starigos en la venonta jaro la rubrikon "Temo Proponita de Legantoj" kaj raportos pli multe laŭ la deziro de la legantoj. Ilia interesa temo estas ĉiam bonvena al ni.

II

Ni estis redaktantaj tiun ĉi numeron en la momento, kiam okazis en Pekino la Kvara Monda Virina Konferenco. Nia raportistino faris intervjuon en la konferenco, kiu koncernas la estontecon kaj interesojn de la mondaj virinoj. En tiu ĉi numero ni aperigis la artikolon "Festo por la virinoj". Ni ĝojas, ke 19 esperantistinoj el Japanio, Usono kaj aliaj landoj partoprenis en la Forumo de Neregistaraj Organizoj kaj iuj el ili gastis ĉe ni. La artikolo "Esperantistinoj en la NRO-Forumo" raportas pri ilia aktivado en Pekino.


La Red.

ENHAVO

- 2 *INTER NI*
- 4 90 jaroj de ĉinaj filmoj
- 6 Junularo kaj Esperanto
- 8 *ORIGINALE VERKITAJ:*
La morto de Paco
- 10 *ĈINAJ E-ISTOJ:*
Ordinara samideano Ivan Ko
- 13 *ESP-NOVAĴOJ*
- 14 *POR KOMENCANTOJ:*
Maltrafo de policanoj
- 15 Festo por la virinoj
- 20 *REORDIGO DE HUAIHE-RIVERO:*
En la malsupra baseno de
Huaihe-rivero
- 24 Prosperigo de antikva urbo ĉe
Yangzi-rivero
- 26 *FAMAJ URBOJ:*
En antikva urbo Langzhong
- 28 *MULTNACIA ĈINIO:*
Originalaj naciaj moroj de Ĉinio
- 30 *BELECO DE ĈINIO:*
Familio de aktoroj-kampanoj
- 33 *EL ĈINAJ GAZETOJ*
- 35 Esperantistinoj en NRO-forumo
- 38 *KURANTAJ AFEROJ*
- 40 Montanoj penas por nova celo
- 42 Direktoro el kampano
- 43 Blinduloj adiaŭu mallumon
- 44 Familioj en profundo de dezerto
- 46 La somera tendumo en la monto Koko
- 48 *POR VIA SANO:*
Masaĝo en la ĉiutaga vivo (VIII)
- 49 *FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO:*
Amo de maljunuloj
- 51 *GALERIO:*
"Nokta Amuzado de Han Xizai"
- 2 Sur burĝono
- SUR LA KOVRILO:*
Partoprenantoj de la Kvara Monda
Virina Konferenco sur la Granda Muro
Foto de **Liu Sigong**
- SUR LA DORSKOVRILO:*
Denove rubriko pri la Silka Vojo, sed
la Norda

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Tarim-baseno (p. 44)
2. Linzhou (p. 40)
3. Yichang (p. 24)
4. Monto Koko (p. 46)



90 jaroj de ĉinaj filmoj

POSTTAGMEZE de vintra tago antaŭ 100 jaroj s-ro Louis Lumiere de Francio unuafoje projekciis en kafejo de Parizo filmojn faritajn de li mem. Li projekciis “Ĉe la enirejo de fabriko”, “Fervoja stacio”, “Ĝardenisto” kaj aliajn 9 filmojn. Ĉiu filmo daŭris unu minuton, tamen tio allogis multajn rigardantojn. Tio estis la unuafoja komerca prezentado, tial oni nomas la 28-an de decembro 1895 la naskotago de la monda filmo.

Post nelonge, ankaŭ en Ĉinio okazis projekcio de filmo. Tiam oni nomis tiun ĉi importajon okcidenta teatro. En la okuloj de la tiamaj ĉinoj ĝi estis nur amuzaĵo. La projekciado okazis plejofte en malnovtipaj teatroj aŭ tesalonoj. Ĉiuj filmoj projekciitaj estis enkondukitaj de eksterlandaj komercistoj.

En Ĉinio la plej fruaj filmistoj estis eksterlandanoj. La francaj fratoj Lumiere kaj kameraisto de usonano Thomas Alva Edison faris filmadon en Ĉinio. En 1905, t.e. 10 jarojn post la naskiĝo de la filmo, ankaŭ ĉinoj faris filmadon. S-ro Ren Jingfeng (Ĵen Ĝingfeng), mastro de fotografejo en Pekino, intencis mem fari filmadon kaj aĉetis francajn lignan kameraon kaj 14 rulojn da kartoĉoj en magazeno funkciigata de alilandanoj. Post tio li invitis s-ron Tan Xinpei (Tan Ŝinpej), faman ĉinan artiston de pekin-opero, prezenti batalajn scenojn de opero en la korto de la fotografejo. S-ro Ren kaj fotisto Liu Zhonglun filmis lian prezentadon. Ili laboris 3 tagojn kaj finis la filmadon de “Dingjun-(Dingĝjun)-monto”. Kvankam la

filmo registris nur kelkajn fragmentojn de la opero, tamen ĝi markis la komencon de la ĉinaj filmoj. “Dingjun-monto” ja fariĝis la plej frua drama filmo en Ĉinio.

La plej frua rakonta filmo de Ĉinio estis “Malfeliĉaj geedzoj” farita de Zheng Zhengqiu (Ĝeng Ĝengĉiŭ) kaj Zhang Shichuan (Ĝang Ŝiĉuan) en 1913. La filmo montras, kiel paro da nekonataj gejunuloj eniris en la novgeedzan ĉambron post svatado kaj rutinaj ceremonioj. La filmo daŭris 30 minutojn. Ĝi estis farita laŭ la pretigita scenaro sub la gvido de reĝisoro. Post tio s-roj Zheng kaj Zhang plurfoje kunlaboris. En 1916 s-ro Zhang fondis la filman kompanion Huangxian kaj produktis la filmon “Nigra fantomo”, kiu konigas la malutilon de opio. Ĝi estis bone konata filmo komence de la 20-aj jaroj kaj ĝia reĝisoro Zhang Shichuan fariĝis unu el la fondintoj de la ĉina filmo.

En la 20-aj jaroj en Ĉinio komenciĝis grandskala kreado de filmoj kaj fondiĝis multaj filmaj kompanioj. Kaj en 1925 la nombro atingis 175. La naskiĝo de longaj rakontaj filmoj puŝis la kreadon de ĉinaj filmoj al nova etapo. La silenta filmo “Orfo savas la avon”, verkita de Zheng Zhengqiu kaj reĝisorita de Zhang Shichuan, akiris grandan sukceson. La filmo rakontas, ke filo de riĉulo mortis falinte de sur ĉevalo kaj restis la riĉulo kaj lia graveda bofilino Weiru (Ŭejju). Nevo de la riĉulo avidis liajn riĉaĵojn kaj kalumniis, ke Weiru estas malĉasta, kaj forpelis ŝin el la hejmo. Elpelite, Weiru naskis Yu Pu. Pasis dekkelkaj jaroj. Ĝuste kiam la nevo pretis atenci la maljunan riĉulon, Yu Pu alvenis al la

hejmo kaj savis sian avon. La malsimpla intrigo kaj edifa signifo de la filmo tre plaĉis al la rigardantoj.

En la lastaj jaroj de la 2-a jardeko la filmoj eniris en la stadion de sonfilmo. En 1930 ĉina reĝisoro Sun Yu faris epizodon “Serĉi fraton” registritan per vaksa gramofona disko al la filmo “Gejunuloj en tumultaj jaroj”. Ĝi estis la unua filma kanto en Ĉinio. La filmo “Kantistino Ruĝa Peonio” produktita en 1930 faris sensacion en grandaj urboj de Ĉinio, ĉar la filmo estis tre kortuŝa kaj ankaŭ la unua ĉina sonfilmo. La filmado daŭris 6 monatojn kaj la sonregistrado sukcesis post pluraj malvenkoj. Post tiu ĉi filmo, dank’ al la progreso de sonregistrado la ĉinaj filmoj eniris en la stadion de sonfilmo kaj en 1936 la sonfilmoj anstataŭis la silentajn.

Tiam aperis aro da junaj reĝisoroj. Ili faris esploradon de registrado de sono kaj bildoj de la filmoj. Tio multe akcelis la disvolvigon de filmoj. Jen filmoj sin turnis el simplaj amuzaĵoj en arton en la vera senco de la vorto. En la 30-40-aj jaroj la progresemaj filmistoj reprezentataj de s-ro Xia Yan (Ŝja Jan) prenis realisman priskribon kaj senkompatan malkaŝon de la socia mallumo kiel la celon de filma verkado. Laboristoj kaj kamparanoj, vivantaj en la socia fundo, unuafoje vigliĝis sur la filmaj ekranoj. En tiu tempo riĉiĝis la enhavo de la filmoj, kiuj distingigis per trajto de la epoko. La ĉinaj filmistaj rondoj atingis sian novan kulminon de disvolvigo.

La virina temo estis unu el la multe atentataj temoj de la tiamaj filmistoj. La filmo “Firmvola virino” reĝisorita de Wu Yonggang ra-

kontas, kiel malfeliĉan vivon prostituitino havas. Ĉe la eklumiĝo de la noktaj lampoj ŝi endormigis sian infanon kaj eldomiĝis. Evitante policiston, ŝi estis tamen seksatencita de fripono. Ŝia prostituiteco multe malhelpis ŝian infanon, kiu diligente lernis en la lernejo. La infano estis malestimata kaj eĉ forpelita el la lernejo. Sen eliro ŝi mortigis la friponon, kaj pro tio ŝi estis malliberigita. Kun sopiro pri sia infano kaj deziro pri nova vivo, ŝi firmvole vivis en la prizono... La heroino de la filmo estis rolata de talenta aktorino Ruan Lingyu (Ĵuan Lingju), kiu viglis sur la frutempa filma tereno de Ĉinio. Ŝia ludado estis simpla, senĝena, profundpensiga kaj sukcese montris la bonkorecon kaj malcedemon de la ofendataj kaj malestimataj ĉinaj virinoj kaj vekis fortan simpatiecon de la rigardantoj. Ruan Lingyu ja fariĝis unu el la aktorinoj plej ŝatataj de la ĉinaj spektantoj. Tamen, tiu ĉi fama aktorino, kiu ludis la rolon de pli ol 20 virinoj de malsamaj socitavoloj, estis maljuste traktata en la reala vivo kaj fine sin mortigis por montri sian noblecon. Ŝi iam diris, ke la postdorsa kalumnio estas mortiga. En la 90-aj jaroj ŝia historio estis sur-ekranigita de Hongkong-a reĝisoro Guan Jinpeng (Guan Ĝinpeng) kaj la filmo estis premiita en la Internacia Filma Festivalo en Berlino.

Ankaŭ la filmo "Fiŝista kanto" reĝisorita de s-ro Cai Chusheng estis eminenta filmo en la 30-aj jaroj. Ĝi montris, kiel ofenditaj estis fiŝisto kaj lia fratino. La kanto de la filmo per trista melodio montris la suferojn kaj indignon de la fiŝistoj. Ĝi vaste cirkulis siatempe en Ĉinio. En 1935 ĝi gajnis honoran premion en la Internacia Filma Festivalo en Moskvo. Ĝi estis la unua internacia premio gajnita de la ĉina filmista rondo. En 1947 s-roj Cai Chusheng kaj Zheng Junli (Ĝeng Ĝjunli) kune verkis kaj reĝisoris la klasikan filmon "Orienteno fluas printempa rivero". La filmo temas pri la renkontiĝo kaj disiĝo de Zhongliang kaj lia edzino Sufen en la Kontraŭjapana Rezist-

milito. La degenerado de Zhongliang kaj la malfacila vivo de Sufen spegulis du mondojn kaj la vivon de homoj de du specoj. La bonkoreco de Sufen kaj ŝia malfeliĉa sorto vekis grandan simpatiecon de la spektantoj. La filmo estis prezentata sinsekvajn 3 monatojn kaj rekordis tiurilate en la tiaman Ĉinio.

La filmoj "Printempaj silkraŭpoj" kaj "24 horoj en Ŝanhajo" verkita de Xia Yan, "Larĝa vojo" reĝisorita de Sun Yu, "Gejunuloj en tumulto" reĝisorita de Xu Xingzhi (Ŝju Ŝingĝi), "Anĝeloj sur strato" reĝisorita de Yuan Muzhi kaj "Sur la vojo longa je 4 000 km", "Lumoj en dekmil hejmoj", "Korvoj kaj paseroj" produktitaj en la 40-aj jaroj estas aparte admirindaj en arto. La geaktoroj Jin Yan (Ĝin Jan), Zhao Dan, Zhou Xuan (Ĝou Ŝĵuan) kaj Bai Yang konkeris la koron de la spektantoj per sia elstara ludo.

De 1949, kiam naskiĝis la nova Ĉinio, ĝis la lasta periodo de la 70-aj jaroj, la ĉina filma afero spertis longtempan stagnadon, tamen naskiĝis nemalmultaj eminentaj verkoj. Aprile de 1949 naskiĝis "Ponto", la unua rakonta filmo de

la nova Ĉinio, kiu konigas la sindoneman laboron de la fervojistoj de la nova Ĉinio. "Blankhara knabino" estis la plej eminenta rakonta filmo en la komenca periodo post la fondiĝo de la nova Ĉinio. Ĝi rakontas, kiel kruele persekutata estas Xi'er (Ŝji'er), filino de malriĉa kamparano. Por eskapi el persekutado ŝi fuĝis en profundan montaron kaj ŝiaj haroj blankiĝis. La filmo igis la nove mastrigitajn laborulojn pli forte malami la malnovan socion kaj ami la novan Ĉinion. "Liang Shanbo kaj Zhu Yingtai", la unua kolora drama filmo de la nova Ĉinio, konigas la tragedion de la amo de la ĉinaj Romeo kaj Julieta.

Aparte menciindas la filmoj, produktitaj en la 50-60-aj jaroj kaj temantaj pri revolucio kaj milito. Ili plejparte estis nigrablankaj. Kvankam arte ili ne estis maturaj, tamen la herooj estis bravaj revoluciuloj. La filmoj "Letero kun koka plumo", "Shanggan-monto", "Neniam malaperontaj ondoj de radio", "Revolucia familio", "Vivi eterne en la revolucia flamo" k.a. havas gravan influon sur plurajn generaciojn.

Ekde la 80-aj jaroj la filma afe-

Zhou Xuan (maldekstre), ĉefrolulino de la filmo "Sekreta Historio de Qing-dinastio" en la 40-aj jaroj





Bai Yang (maldekstre), ĉefrolulino de la filmo "Benopeta Ofero" en la 50-aj jaroj



Sceno el la filmo "Songō en Ruĝa Buduaro" en la 80-aj jaroj

ro denove prosperis en Ĉinio. Oni nomas tiujn jarojn nova stadio de la ĉina filmo. Aperis nombro da filmoj, kiaj "Xiaohua" (Ŝjaŭhŭa), "Sha Ou" kaj "Najbaroj". En tiu periodo leviĝis aro da filmistoj naskiĝintaj en la 50-aj jaroj. Dank' al ilia penado ĉinaj filmoj vekis atenton de la internacia filmista rondo. Tiu 5-a generacio de Ĉinio konsistas el filmistoj Chen Kaige, Zhang Yimou, Wu Ziniu, He Qun (He Ĉjun) kaj Tian Zhuangzhuang. En la filmoj, kiaj "Leŭsa tero", "Ruĝa sorgo", "Xiang Yu (Ŝjang Ju) adiaŭas sian edzinon", "Reguloj de ĉasejo" kaj "Unu kaj ok", oni donis apartan atenton al la unueco de la enhavo kaj formo, al koloroj kaj efekto de la bildoj. Oni faris fotoĝrafiajn aŭ sur la fono de la senlima Leŭsa Altebenaĵo, aŭ penetrigis ruĝon en la tutan filmon, kio vekis emocian artan efekton. Per

tiuj filmoj oni gajnis internaciajn premiojn foje-refoje. Kompreneble, la 5-a generacio faras ankaŭ alian penadon. Ili faras ĉion eblan por kombini la personan trajton kun la bezono de la publiko kaj merkato. Ili ja estas certaj, ke la ĉinaj rigardantoj atendas, ke ili produkti pli multajn kaj pli bonajn filmojn.

Nun Ĉinio havas la kapablon produkti 150 filmojn ĉiujare. Ĝi havas superan lernejon por kulturaj profesiajn filmistojn. En ĝi laboras mondfamaj reĝisoroj, kiaj Xie Jin (Ŝje Ĝin), Xie Fei kaj Zhang Yimou, kaj mondnivelaj aktoroj, kiaj Gong Li, Liu Xiaoqing (Liŭ Ŝjaŭĉing), Ge You kaj Jiang Wen (Ĝjang Ŭen). Kompreneble, kompare kun iuj landoj, Ĉinio ankoraŭ devas fari multon, sed estas sendube, ke Ĉinio jam eniris en la torenton de la mondaj filmoj kun siaj naciaj trajtoj. ■

I NTER La 11-a kaj 14-a de aŭgusto okazis en Tianjin, Ĉinio, la 14-a Komunista Seminario, kiun partoprenis ĉ. cent junaj esperantistoj de Koreio, Japanio kaj Ĉinio. La temo de la seminario estis "Junularo kaj Tradicia Kulturo".

Por plifortigi la kontaktiĝon kaj kunlaboron inter junaj e-istoj de tiuj landoj kaj disvolvi la junularan E-movadon, la Ĉina Junulara Esperanto-Asocio (ĈJEA) kaj la junulara sekcio de la Tianjin-a Esperanto-Asocio (TEA) kune organizis tiun seminarion. Estis la unua fojo por junaj esperantistoj de la tri landoj kunsidi en Ĉinio.

En la inaŭguro la prezidantoj de ĈJEA, Japana Esperanto-Junularo kaj Korea Esperanto-Junularo donis salutvortojn. Poste, ses reprezentantoj prelegis pri la temo de la seminario. Korea samideano Oh Tae Young serioze preparis prelegon kaj anticipe disdonis la tekston el kvin partoj. Li opiniis, ke tradicio estas heredaĵo de pasinteco, oni devas krei novon el tradicio kaj forĵeti tion, kio ne taŭgas por la disvolviĝo. Ne estas problemoj, ke ni akceptas alian kulturon, sed problemoj estas, kiel ni akceptas ĝin. Ni devas teni ĝustan kritikismon. Ni junuloj devas teni amon je nia kulturo kaj havi senfinan krea spirito. Japana preleganto Muramutu Sin-ya analizis la nunan kulturan tendencon de Japanio, ke junuloj multe zorgas pri akiro de mono. Tio ne gravas, se oni ankaŭ donas atenton al tradicio. Kiel ĉina preleganto, mi unue konigis la aŭskultantojn pri la tradicia ĉina kulturo kaj komparis la ĉinan tradicion kun la eksterlanda moderna koncepto kaj poste faris demandon: "Kiel ni junuloj traktas la rilaton inter la tradicia kulturo kaj la moderna?" Laŭ mi, junuloj devas doni energion al starigo de la sana kulturo utila al la progreso.

SUN AIJUN:

Junularo kaj Esperanto

— Pri la 14-a Komuna Seminario en Tianjin



Ĉinaj, japanaj kaj koreaj esperantistoj en parko de Tianjin

Post la prelegoj oni libere diskutis pri tio. Multaj venis al la sama opinio, ke junuloj devas unuflanke heredi kaj disvolvi la kvintesencon de la tradicia kulturo kaj aliflanke lerni la fortaĵon de la moderna civilizacio, por ke ilia lando kaj ilia popolo pli potenciĝu kaj pli riĉiĝu.

En Tianjin okazis tri amuzaj vesperoj, kiuj profunde impresis la ĉeestantojn. La ĉina pupteatraĵo kaj tradicia ĉina gimnastiko ricevis varman aplaŭdon. Estas menciindaj *gongfu*-o kaj glava danco prezentitaj de la 9-jara ĉina knabo Wang Qing (Ŭang Ĉing). Li lerte svingis 1-metran glavon, kiu donis plaĉan sonoron tra la aero. Oni retenis la spiron

kaj spektis kun streĉitaj okuloj. Korea fraŭlino Min Jung Jin gajnis la titolon “Dancista Reĝino” de la seminario per tradicia korea danco “Bongsan-maskodanco”. Ŝi ofte demandis: “Ĉu vi konas Min?” Certe jes, ĉar ŝi estas Min, bela korea fraŭlino. Ankaŭ programeroj de japanaj e-istoj kaj amuzaj ludoj multe ĝuigis la rigardantojn. Dum nia restado en Tianjin ni estis kontentaj ankaŭ pro vizito al tradicia ĉina strato kaj nutraĵo-strato kaj ekskurso al parko, kie ni, starante sur kvin-etaĝa turo, havis panoraman vidon al la urbo.

Post sia fondiĝo ĈJEA jam plurfoje organizis E-kunsidon enlande. Sed estis la unua fojo por

ĝi kaj por TEA okazigi tian internacian kunvenon. En la seminario oni renkontis iujn problemojn, kaj foje eĉ aperis malordoj. Tamen dank’ al subteno de la Ĉina Esperanto-Ligo, helpo de spertaj samideanoj de Japanio kaj Koreio kaj komprenemo de la partoprenantoj, la 14-a Komuna Seminario fermiĝis kun sukceso.

Japana s-ano Hujiwara Keisuke resumis la seminarion kiel jene: la 14-a Komuna Seminario en Tianjin estas interesa, feliĉa, bona, bela, sukcesa, signifoplena kaj neforgesebla. Li esperis, ke la ĉeestantoj rerenkontiĝos en la 15-a Komuna Seminario venontjare en Japanio. ■

La morto de Paco

de LAŬLUM

“**M**I venas rakonti al vi pri mia kuzo Paco,” diris la blankhara maljunulino Krizantema, apenaŭ eksidinte sur la rando de la briklito, kovrita de okulplaĉa littuko kun peoniaj floroj en brilaj koloroj. “Hieraŭ vespere vi diris, ke via japana amiko ne komprenas, kial ĉinoj ankoraŭ uzas la ŝokan esprimon ‘japanaj diabloj’ en rakontoj pri la pasinta milito, se ni volas amikecon inter la ĉina kaj japana popoloj. Rakontu al li pri la morto de mia talenta kuzo Paco, kaj eble solviĝos lia problemo.”

Ŝi akceptis, per sia ĉiam tremetanta mano, la tason da teo, al ŝi prezentatan de la sinjoro el urbo, ekblovetis al la varma aroma trinkaĵo, prenis plenbuŝon kaj daŭrigis, detektinte per rapida rigardo aprobon de sia sola aŭskultanto en la ĉambro.

“Ne kredu la babilojn pri amo inter mi kaj Paco! Tio estas nur klaĉo! Sed mi rakontu al vi la veran historion pri mia kuzo, pri la plej klera instruisto por la knaboj, la plej lerta lignaĵisto, la plej populara kaligrafo kaj rakontisto de nia vilaĝo. Mi rakontos mallonge nur la veran historion. Se vi volas kolekti historiojn de viktimoj en la milito, do etendu al mi viajn orelojn!”

La blankharulino denove trinketis el la taso, verŝajne nur por iom ordi sian penson. Ŝiaj okuloj iom enkaviĝintaj kaj vangoj jam sulkoplenaj atestas ŝian altaĝecon, tamen ankoraŭ videblas ĉe ili trajtoj de ĉarmeco en la

junaĝo. Ŝi rapide remetis la tetason kaj daŭrigis:

“Mi konservadis la belulinan figuron el osto, ĉar ĝi estis tiel bela. Mi ne fordonus ĝin kontraŭ juvelo. Se mi ne perdus ĝin dum ‘balaado’* de japanaj diabloj, mi ĝin montrus al vi, por ke vi mem vidu la majstraĵon! Eble ie ankoraŭ troviĝas meblo kun lia gravuraĵo. Sed kiu scias... Ho, vere bedaŭrinde, ke li trafis tian tragikan finon!”

Estas rimarkeble, ke ŝiaj lipoj kaj palpebroj tremetis de emociiĝo kaj ŝia animo ekscitiĝis de refreŝiganta memoraĵo pri foraj pasintaĵoj.

“En 1937 la japanaj invadantoj okupis Hebei-provincon, tamen ne povis veni al nia vilaĝo. Mankis al ili tempo kaj personaro por tio. Sed rapide disetendiĝis ilia giganta aranea reto: unue konstruiĝis fortikaĵoj en la urbetoj, poste ili disetendis siajn ungojn al la ĉirkaŭaj vilaĝoj. Por defendi siajn rikoltaĵojn kaj vivojn, aktivis ankaŭ kamparanaj memdefendaj trupoj. En la aŭtuno de 1938, iutage Paco estis vokita en la elementan lernejon de la vilaĝo kaj ricevis taskon de la vilaĝestro skribi, laŭ ordono de la japana armeo, la nomon de la vilaĝo, sur muro ĉe vilaĝfino. Kredeble, la invadantoj komencos novan artifikon. Paco fartis ne bone, tial prokrastis kelkajn tagojn. Fine, urĝite li iris kun siaj kompanoj Ferbulo kaj Simio al la orienta vilaĝfino, portante eskalon, penikon kaj sitelon da kalkaĵo. Estis Simio, kiu poste detale rakontis al mi ĉion, kion li travivis.”

Nun la ĉambro komencis malheliĝi pro la subiro de la suno, kaj Krizantema etendis sian manon kaj ŝaltis la lampon, kiu lumigis ŝin kaj ĉion alian per feblaj flavaj radioj. Kaj ŝi ne paŭzis en sia rakonto.

“Kiam ili starigis la eskalon ĉe vasta dorsmuro de iu domo ĉe la vilaĝfino, Ferbulo diris al Paco: ‘Se vi ankoraŭ vertiĝas pro malsano, do mi skribu anstataŭ vi, kvankam mi ne povas skribi tiel bele kiel vi. Mi ne volus riski rikolton de moko pro mia kruda skribaĵo, tamen mi timas, ke vi falus...’ Simio lango-klakis sian aprobon. Paco danke konsentis kaj atentigis, ke li skribu zorge por vere lin helpi. Jes-jes-ante, Ferbulo facile surgrimpis la eskalon kaj komencis labori. Estis varmege, ŝvito kaj insektoj ĝenadis lin. Kiam li finis la unuan

ideogramon de la vilaĝa nomo, montriĝis ke aldoniĝis al ĝi maldikaj vertikalaj strekoj, kiuj ne devis esti, sed naskiĝis pro libera malsuprenfluo de la abunda kalkaĵo.

“Skribu zorge! Kial tiom multe da kalkaĵo! Paco timis riproĉon pro la fuŝaĵo.

“Se mi antaŭvidus tian fuŝon, mi ne devus skribi anstataŭ vi. Neeblas lertiĝi laŭdezure!”

“Paco tuj decidis mem skribi kaj transprenis la penikon kaj sitelon. Kiam li ekgrimpis supren, li rimarkis la cikatron sur la dekstra kruro de Ferbulo. Tio estas memoraĵo pri ilia ŝerco dum herbokolekto. Ferbulo diris al Paco, ke li vidis Simion amindumanta la fratineton de Paco. Paco ruĝiĝis, tuj komencis lin persekuti. Ferbulo lerte grimpis sur dikan salikon. Paco svingis al lia kruro sian falĉileton kaj vundis lin. Paco paliĝis je ekvido de la sangado, rapide alprenis dentpulvoron kaj bandaĝis la vundon. Li petis, ke Ferbulo kaŝu tion al sia patro. La vundito kulpigis sin mem kaj mensogis al sia patro pri la vundiĝo. Poste Paco kaj Ferbulo fariĝis pli intimaj amikoj. Ekvidinte la cikatron, Paco pretervole deturnis sian rigardon, kaj subite li rimarkis, ke homoj en flavaj uniformoj venas al ili.

“Japanaj diabloj!” li alarmis mallaŭte per timoplena voĉo.

“Ferbulo kaj Simio ĉirkaŭrigardis kaj rimarkis, ke vere alproksimiĝas taĉmento da japanaj soldatoj. Ili kvazaŭ paralizigis. Sed Paco tuj komencis forkuri, kaj el la japana trupo aŭdiĝis kriĉoj kaj hurloj. Aŭdiĝis pafoj! Paco venis al viro laboranta ĉe puto, kiu rimarkis, ke lia kruro sangas, kaj buŝe signis al li la nemalproksiman sorgokampon. Paco tuj direktiĝis al la bona kaŝejo, sed lia vundita kruro fariĝis terura balasto. Apenaŭ li sin ĵetis en la sorgan densaĵon, japana soldato jam atingis lin, pikis en lian dorson per sia bajoneto kaj ĝin turnis du-trifoje.

“Dume, Simio kaj Ferbulo estis ĉirkaŭitaj de la japanaj diabloj kaj baldaŭ la vilaĝanoj, kiuj ne povis sin kaŝi, estis alpelitaj. Komenciĝis pridemandado far la oficiro, kiu scipovis balbuti ĉine. Post longa pridemandado la oficiro komprenis, ke okazis miskompreno: Li prenis la tri virojn kiel rezistantojn, kiuj skribis kontraŭjapanajn sloganojn sur la muro. Se ili skribis la nomon de la vilaĝo, tio estis en ordo,

sed ili ne devus prokrasti plenumon de la ordono. Li montris afablan rideton kaj eĉ bonvolis peti pardonon pro la pafoj kaj piko, kaj esprimis sian sinceran volon de paco. Li ordonis disiĝi la vilaĝanojn perforte kolektitajn kaj pace formarŝis kun siaj armitaj kamaradoj.

“Paco jam estis portita en lian hejmon, sed savo al lia vivo jam neebulis. Li ricevis ne nur vundojn de kuglo kaj bajoneto, sed ankaŭ kirlon de la ŝtala klingo en lia viscereto. Li eĉ ne povis diri adiaŭ al sia juna graveda edzino kaj siaj gepatroj, kiuj ligis multe, multege da espero al li. La patrino svenis dufoje pro perdo de sia sola filo. Ankaŭ mi svenis je ekvido de la sangmakulita kadavro de Paco, kaj de tiam tremadas miaj manoj.”

La voĉo de la maljuna Krizantema kvazaŭ sufokiĝis kaj fariĝis apenaŭ aŭdebla, sed tiam ŝi subite rimarkis la preskaŭ flegman trankvilecon de sia aŭskultanto, ŝi indigniĝis kaj laŭtis:

“Sed nun kiu ankoraŭ memoras lin, memoras la tragikajn pasintaĵojn? Liaj gepatroj mortis nelonge poste pro aflikto kaj lia edzino iris al alia viro, postlasante sian filineton, naskitan post la morto de Paco, al la bofratino, kiu aliĝis poste al la Okavoja Armeo sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio. La nomo de Paco estas ĉizita en la monumenton al la martiroj en la Rezistmilito starigitan en 1945. Sed kiuj hodiaŭ atentus pri la kadukiĝinta konstruaĵo? Kiuj volus pensi pri la sangaj tagoj malproksimiĝintaj? Por ne paroli pri la juna generacio, eĉ la maljunuletoj jam forviŝis el sia malforta memoro ĉiujn malklarajn bildojn tragikajn, pro la paco kaj feliĉo, kiuj povas ebriigi ĉiujn prudentulojn...”

La rakontanto ĵetis rigardon al sia aŭskultanto, kvazaŭ por detekti, ĉu ankaŭ li tiel opinias. Sed ŝi subite rememoris, ke la gasto ja venis speciale por kolekti historiojn pri la viktimoj, kaj ŝi iom konsoliĝis pro tio kaj lace diris:

“Tenu l’ pasintaĵon en memoro, ĝi nin helpos kiel mentoro!” ■

“Balaado” estis ĉirkaŭatako far japanaj okupantoj por ekstermi rezistantojn.

Ordinara samideano

Ivan Ko

Teksto de SUN AIJUN

Fotoj de LI RENBIAN



S-ro Ivan Ko en la redakcio de El Popola Ĉinio

IVAN Ko havas apartan fortunon ĉe Esperanto. Dekkelkjara, li eklernis Esperanton kaj poste laboris pli ol 30 jarojn per Esperanto por “El Popola Ĉinio”.

Dum tiu tempodaŭro Ivan Ko sin okupis 26 jarojn pri korespondo kun diverslandaj legantoj. Ĉiutage li devis skribi 3-5 leterojn al legantoj, tial pere de liaj manoj estis ekspeditaj sume pli ol 10 000 leteroj. Se vi estas malnova abonanto de “El Popola Ĉinio”, vi probable havas almenaŭ unu leteron skribitan de li en la nomo de la redakcio.

Ivan Ko estas ĉiam fidela al la Esperanta afero. Eĉ hodiaŭ, post sia emeritiĝo, en la aĝo de 81 jaroj, li ankoraŭ legas ĉiun numeron de la gazeto kaj montras ĝiajn lingvajn plibonigendaĵojn al siaj junaj kolegoj.

Ivan Ko ĉiam laboris serioze. Afabla kaj indulgema, li pri nenio plendis. Liaj kolegoj diris, ke Ivan

Ko, same kiel sia nomo, estas tute ordinara (Ivan en la ĉina lingvo signifas “ordinara”), tamen estas heroo malmulte konata en nia Esperantujo.

AMO AL ESPERANTO

Ivan Ko estas Jiangsu-ano. Antaŭ 60 jaroj, kiam li lernis en la urbo Tianjin (Tjanĝin), li hazarde vidis Esperantan felietonon de laborsindikata organo ĉe sia angla-lingva instruisto. Li estis tuj kaptita de iu mistera forto. Li serĉadis en la tuta urbo kaj fine en malgranda librovendejo sukcesis aĉeti Esperantan lernolibron. Sen instruisto li mem lernis kaj ellernis Esperanton. En 1932 li aliĝis al la Ŝanhaja Esperantista Asocio kaj eklaboris kiel peranto de “La Mondo”, la organo de la asocio, en Tianjin. Komence de la 30-aj jaroj, en Tianjin estis malmulte da esperantistoj kaj la loka Esperanto-movado ĵus burĝonis. Ivan Ko estis aktivulo de la

urba Esperanto-movado. Li instruis Esperanton en lokaj kursoj kaj starigis amikecon kun esperantistoj de Germanio kaj Japanio loĝantaj en Tianjin.

De la 30-aj jaroj ĝis la fino de la 40-aj jaroj, ĉar plejparto de la esperantistoj estis progresemluloj aŭ revoluciuloj, tial Esperanto estis rigardata de la instanco kiel danĝera lingvo, kaj la movado devigite fariĝis subtera, kelktempe eĉ stagnis. Tamen Ivan Ko ne forlasis Esperanton.

Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949, la ĉina Esperanto-movado eniris novan periodon. Aperis la Esperanta gazeto “El Popola Ĉinio” kaj poste fondiĝis la Ĉina Esperanto-Ligo. En la fond-kunveno de la ligo Ivan Ko konatiĝis kun Hujucz, Zhang Qicheng (Ĝang Ĉjiĉeng), Venlo Fon kaj aliaj ĉinaj veteranaj esperantistoj kaj informiĝis, ke la Esperanta afero de la nova Ĉinio urĝe



S-ro Huang Hua (maldekstre), vicprezidanto de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio, kaj s-ro Ivan Ko (staranta) en la te-kunsido por festi la 35-jaran jubileon de EPC en 1985

bezonas profesiajn laborantojn. En oktobro 1952 li memvole venis al Pekino kaj eklaboris kiel profesia laboranto por Esperanto. Ekde tiam Esperanto fariĝis grava konsistiga parto de lia vivo.

SINCERA KONTAKTO KUN LEGANTOJ

Esperanto estas ponto de amikeco inter diverslandaj popoloj. Se "El Popola Ĉinio" estas unu el la fundamentaj ŝtonoj de tiu ponto, do ĝia korespondo ja estas nemankigebla cemento por kunligi ĉiujn ŝtonojn.

Kun entuziasmo por Esperanto kaj EPC-legantoj Ivan Ko devokonscie kaj serioze traktis kaj respondis ĉiujn iliajn leterojn. Krome li kompilis bultenon "Reagoj de Legantoj" por raporti al la redakcio opiniojn kaj dezirojn de legantoj, kun la celo pliriĉigi la enhavon de la gazeto. Por koni la novan situacion de la internacia Esperantomovado, li multe enketis kaj liveris al la redakcio tiuflankajn informojn.

Ĉiutage Ivan Ko devis trakti diversajn leterojn: iuj volis aboni la gazeton, aliaj serĉis korespond-amikojn, triaj petis fari aĉeton. Li ĉiam klopodis kontentigi iliajn dezirojn. Li akumulis riĉan sperton

en korespondo kaj skribis artikolojn pri Korespondo en Esperanto por la gazeto "La Mondo". Tiuj artikoloj multe helpis ĉinajn komencantojn altigi sian lingvan nivelon en korespondo kaj kulturi en si amon al Esperanto.

Ivan Ko diris: "Mi amas mian laboron. Korespondi signifas disvastigi Esperanton kaj ebligas al ni havi pli da amikoj. Ĉiutage mi kun amikeco kaj sincereco skribe parolas kun legantoj kaj samtempe estas kortuŝita de iliaj malkaŝemo kaj sincereco. Korespondo malfermis fenestron de la animo."

AMIKECO LONGEDAŬRA

Ivan Ko skribis senmombrajn leterojn, sekve liaj amikoj troviĝas tra la tuta mondo.

En 1985 li komencis korespondi kun maljuna brita esperantisto Fred Bridgeland. Du jarojn poste, s-ro Bridgeland forpasis pro malsano. Lia edzino Dorothy Bridgeland fariĝis korespond-amikino de Ivan Ko. En 1988 Ivan Ko petis sian filon, kiu vojaĝis al Britio, fari specialan viziton al s-ino Bridgeland. La lasta ege dankis sian bonkoran ĉinan amikon Ivan Ko, kiu alportis al ŝi ĝojon en ŝia maljuneco.


Franca esperantisto Maurice Su-

jet nun aĝas pli ol 70 jarojn. Li konatiĝis kun Ivan Ko dum la 64-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Svislando en 1979. Poste ili fariĝis intimaj korespond-amikoj. S-ro Sujet trifoje venis al Ĉinio por E-kongreso kaj turismo. La du maljunaj amikoj nun ankorau korespondas.

En la foto-albumo de Ivan Ko germana esperantisto Karl Maier estas lia plej malnova amiko. Antaŭ 60 jaroj ili konatiĝis en Tianĵin dank' al Esperanto. Reveninte al sia patrolando, s-ro Maier iam estis peranto de "El Popola Ĉinio". Nun bone fartas la 94-jara Maier. La amikeco inter li kaj Ivan Ko spertis provon de jardekoj kaj aromas kiel maljuna vino.

En 1987 la redakcio de "El Popola Ĉinio" ricevis leteron de belga leganto s-ro Gislin, kiu skribis, ke dum dekoj da jaroj "El Popola Ĉinio" ĉiam akompanis lin kaj donis al li sennombrajn belajn momentojn. Li testamentis sian havaĵon al la redakcio de "El Popola Ĉinio" en la intereso de Esperantomovado. Ĝuste tia senegoisma oferemo de esperantisto instigas Ivan Ko. Li vidis la brilan perspektivon de Esperanto. Li ne bedaŭras, ke li elektis Esperanton kiel sian okupon kaj laboris dekojn da jaroj por ĝi. ■

S-ro Ivan Ko kaj liaj kolegoj



S-ro Ivan Ko (la dua de maldekstre) en Svislando en 1979

S-ro Ivan Ko (la dua de maldekstre) en Japanio en 1987



ESP-NOVAĴOJ

● Aŭguste de 1995 en la Yangzhou (Jangĝoŭ)-a Mezlernejo de Jiangu (Ĝjangu)-provinco kaj la mezlernejo Lusin de la urbo Yangzhou funkciis someraj E-kursoj por mezlernejoj. S-ro Wang Hanping kaj s-ino Zhao Ziying (Ĝaŭ Zijing) gvidis la kursojn daŭrantajn duonmonaton, kun 50 lernantoj. Tiuj 14-18-jaraj mezlernejoj deziras Esperante korespondi kaj amikiĝi kun eksterlandaj samaĝuloj.

● La 15-an de julio 1995 okazis en Shenyang la 2-a Kongreso de la Lüchuan-a Esperantista Klubo kun la temo: "Internacia Lingvo kaj Esperanto". En la 20-a de julio la klubo ekfunkciigis elementan E-kurson por 2 monatoj, kun pli ol 40 lernantoj. (Liu Weijie)

● De la 20-a ĝis la 27-a de aŭgusto 1995 franca esperantistino Zorka Enizan vizitis Hohhot kaj Baotou de la Interna Mongolio. Ŝi kunsidis kun lokaj esperantistoj. Poste ŝi vizitis la redakcion de EPC en Pekino. Tio estis la deka fojo por ŝi vojaĝi en Ĉinio. (Ni Dongyang)

● La 1-an de septembro japanaj kaj usonaj esperantistinoj, kiuj partoprenis la Forumon de Neregistaraj Organizoj, vizitis la redakcion de EPC. Ili kaj redaktoroj interŝanĝis opiniojn pri virinaj problemoj.

● La 13-an de aŭgusto 1995 okazis en la Nankai-universitato kunveno por festi la 10-jariĝon de la Tianjin(-Tjanĝin)-a E-Asocio. La kunvenon ĉeestis pli ol 100 esperantistoj el Tianjin, Pekino, Japanio kaj Koreio.

(Han Zuwu)

● La 15-an de septembro okazis en Pekino kunveno por festi la 50-an datrevenon de la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito. Ĝin organizis la Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL) kaj ĉeestis pli ol 40 pekinaj esperantistoj. S-ro Chen Yuan, prezidanto de ĈEL, kaj aliaj veteranaj esperantistoj per siaj travivaĵoj pruvis la influon de Esperanto kaj rakontis, kiel samideanoj batalis per Esperanto por la nacia liberigo dum la Kontraŭjapana Rezistmilito. En la kunveno s-ro Laŭlum deklamis la poemon "Batalu ĉiuj kun fervoro". Fine la ĉeestantoj alvokis, ke la ĉinaj esperantistoj per Esperanto servu al la mondpaco.

● De la 18-a ĝis la 28-a de julio 1995, Subotica Esperanto-Societo de Jugoslavio organizis Esperanto-kurson por infanoj. La kurson partoprenis ĉirkaŭ 50 infanoj. (Sanela Zakić)

● La Unua Internacia Albana Esperanto-Konferenco okazos en Durres inter la 3-a kaj 8-a de aprilo 1996, kaj inter la 8-a kaj 14-a estos postkonferenca rondvojaĝo. La programo: Eroj pri la albanaj historio, kulturo kaj Esperanto-movado, ek-

skursa tago. Kontakt-adreso: Albana Esperanto-Ligo, Poste restante, Tirana, Albanio.

(Albana Esperanto-Ligo)

● Fine de aprilo 1995 en Ukrainio gaste estis fama esperantistino Kimie Markarjan, japanino laŭ la deveno, loĝanta nun en Britio. Ŝi venis ĉi tien laŭ invito de Ukrainia E-Asocio kaj privata superlernejo pri administrado, entrepreno kaj juro, kiu troviĝas en la urbeto Slavjansk de Donecka provinco. Dum sia vojaĝo s-ino K. Markarjan vizitis Kievo, Ternopil, Slavjansk kaj Ĥarkiv. En Britio ŝi instruas al lernejoj sorobanon kaj apartajn momentojn de la japana kulturo. Dum sia restado ŝi faris 10 prelegojn al sume ĉirkaŭ 500 aŭskultantoj.

(D. Cibulevskij)

● La 4-an de marto 1995 televid-spektantoj havis okazon rigardi jarkunvenon de esperantistoj en la urbo Nis de Jugoslavio. Unue televidgvidantino parolis pri la signifo de Esperanto, pri malfacilaĵoj de E-societoj en la urbo kaj pri la utileco de Esperanto. En la jarkunveno partoprenis dekoj da geesperantistoj. Ankaŭ ĉeestis reprezentantoj de E-societoj el diversaj lokoj. Post la televida prezentado, multaj interesiĝis pri Esperanto, kaj granda nombro da gejunuloj enskribiĝis por la komenca kurso de Esperanto.

(Jovan Nešić)

En la 2-a Kongreso de la Lüchuan-a Esperantista Klubo



En la kunveno por festi la 50-an datrevenon de la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito



Maltrafo de policanoj

de ZHOU MING

EN la pasinta majo mi vizitis Usonon kun aliaj ĉinaj verkistoj. Per aviadilo ni atingis Nov-Jorkon kaj aĉetis biletojn por flugi al Vaŝingtono. Tamen usonaj amikoj diris: “Estas granda bedaŭro, ke en Usono vi ĉiam vojaĝos per aviadilo kaj ne povos vidi vilaĝojn, arbarojn, kampojn ktp.” Tion mi kredis. Do ni decidis preni ekspresan ŝoseon al Vaŝingtono.

Per aŭto veturigis nin afabla usona nigrulo, kiu loĝas en Vaŝingtono.

La klimato estis tre komforta — nek varma, nek frosta. En serena mateno ni ekveturis.

Survoje ni haltis ĉe kelkaj bienoj kaj paŝtejoj por vizito. Ĝoje ni babilis kun la ŝoforo.

Subite mi vidis, ke ĉe la radioaparato en la aŭto aperas ruĝa lumo. “Kion ĝi signifas?” mi demandis.

“Aĥ, policano avertas, ke mi haltigu la aŭton,” respondis la usona amiko.

“Kio okazis?”

“Mi ne scias. Sur la ŝoseo ne troviĝas policanoj. Usonaj polica-

noj estas tre kapablaj, ili kontrolas per komputilo. Eĉ se vi malobservas trafikajn regulojn en kamparo, ili povas atingi vin per helikoptero.”

La ŝoforo malrapidigis la aŭton kaj haltigis ĝin apud la ŝoseo por atendi la policanon. Baldaŭ venis du policanoj, kiuj unue salutis la ŝoforon kaj petis lin montri licencon kaj poste iradis ĉirkaŭ la aŭto kaj parolis kun la ŝoforo. Fine ili diris pardonon kaj foriris.

Ni daŭrigis la vojaĝon. Mi demandis la ŝoforon: “Se vi pekis, kial ili ne punis vin per mono?” “Ili maltrafis,” li ridis.

“Kio?”

“Ili diris nur, ke estas danĝere, ke mi ofte ŝanĝis la direkton de la aŭto. Ili min avertis kaj ne punis. Fakte, tio estas preteksto por kontroli nin.”

“Kial?”

“Ili rimarkis, ke vi estas azianoj, kaj suspektis vin pri narkotaĵo-komercio. Ĉar ili estas persekutantaj narkotaĵo-komercistojn el Sudorienta Azio. Mi diris al ili, ke vi estas ĉinaj verkistoj. Laŭ via aspekto ili ne plu suspektas vin.”

Interesa maltrafo! ■





Diverslandaj partoprenantoj

Festo por la virinoj

— Pri la Kvara Monda Virina Konferenco de UN

Teksto de SUN AIJUN

Fotoj de LIU SIGONG

EN la homan historion enskribigis la evento: Septembre de 1995 okazis en Pekino la Kvara Monda Virina Konferenco de UN. En la ora aŭtuno ĉi-jare kolektiĝis en Pekino virinoj kun haŭtoj de malsamaj koloroj el diversaj landoj. En malsamaj lingvoj ili unuvoĉe diris: “La floroj de egaleco, disvolviĝo kaj paco disfloru tra la tuta mondo!”

RETROSPEKTIVO AL LA PASINTECO

La Monda Virina Konferenco estas konferenco, en kiu la registaroj de membro-landoj de UN kaj la internacia socio diskutas kaj decidas problemojn pri virinoj.

La problemoj pri virinoj estas ĉiam zorgata de la organizoj pri la socio kaj disvolviĝo sub UN. 1975 estis difinita de UN kiel “La Internacia Jaro de Virinoj”. Junie de la jaro, en Meksiko okazis la Unua Monda Virina Konferenco. En la konferenco estis aprobitaj “Deklaracio pri la Egala Rango de Virinoj kaj Iliaj Kontribuoj al Disvolviĝo kaj Paco” kaj “Platformo de

Agado por Efektivigi la Celojn de la Internacia Jaro de Virinoj”.

Julie de 1980 okazis en Kopenhago la Dua Monda Virina Konferenco. Ĝi opiniis, ke ne estas akirita kontentiga progreso kvante kaj kvalite en altigo de la pozicio de virinoj, kvankam plejparto de la landoj kaj la internacia socio multe klopodis por tio en la pasintaj 5 jaroj. Rilate al tio, la konferenco aprobis “Platformon de Agado por la Dua Duono de la Virina Jardeko de UN”, kiu aparte akcentis la gravecon de enoficigo, sanprotekto kaj eduko.

La geedzoj devas kune fari dommastrumadon kaj plenumi devon de gepatroj; la analfabeteco estos likvidita en la jaro 2000; la averaĝa vivodaŭro de virinoj atingos almenaŭ 65 jarojn... ĉio ĉi estis emfazita en la Tria Monda Virina Konferenco de UN okazinta en Nairobio, Kenjo, julie de 1985. En ĝi estis aprobita “La Nairobia Antaŭvida Strategio al la Jaro 2000 por la Antaŭiro de Virinoj”. Internacie la dokumento estas rigardata kiel programo por altigi la pozicion de virinoj, kun egaleco, disvolviĝo kaj paco kiel sia celo. Ĝi difinis

la projekton, ke antaŭ la jaro 2000 efektiviĝu la celo, ke la virinoj de la mondo estu egalaj al la viroj, partoprenu en la nacia disvolviĝo kaj defendu la mondpacon.

La Kvara Monda Virina Konferenco estas senprecedence grandskala. Pli ol 46 000 personoj partoprenis en la konferenco kaj NRO-Forumo. Okazis kelk-milfoje forumo kaj simpozio. Per debato, interkonsiliĝo kaj apelacio ili esprimis siajn opiniojn kaj atingis la komunan konon, ke pli multe ol iam antaŭe estis diskutitaj la temo de la konferenco "Agu por Realigi Egalecon, Disvolviĝon, Pacon" kaj la subtemo "Sano, Eduko, Enoficigo".

TRA LA MONDO AŬDIĜU LA VOĈO "EGALECO, DISVOLVIĜO, PACO"

En la konferenco, kiu daŭris du semajnojn, la reprezentantoj el 197 landoj kaj regionoj kaj tiuj de internaciaj kaj neregistaraj organizoj faris vastegan interŝanĝon kaj diskuton pri la problemoj, zorgataj de la homaro, precipe de la virinoj.

La problemoj de paco estis aparte atentata en la konferenco. Ĉiuj partoprenantoj tre maltrankviliĝis pri tio, ke la regionaj kaj naciaj konfliktoj metas pli kaj pli multe da homoj en mizeran vivon. Preskaŭ ĉiutage en la konferenco aŭdiĝis parolo kontraŭ milito kaj "formiliton" fariĝis la plej forta voĉo. La partoprenantoj apelaciis pri neuzado de armiloj, ĉesigo de mortigo, nuligo de milito kaj batalo por eterna paco.

El ĉiuj temoj de la konferenco tiu de egaleco estis la plej interesata de la virinoj. Pli ol duono de la diskutoj koncernis la egalecon inter viroj kaj virinoj. En la konferenco iuj ekzemplis tion per la progreso atingita de diversaj landoj tiuflanke en la lastaj jaroj, aliaj faris profundan esploradon pri la vojo por efektiviĝi la veran egalecon inter viroj kaj virinoj, vizaĝe al ĉiaj defioj alfrontataj de la virinoj nuntempe, surbaze de la politika, ekonomia kaj kultura terenoj kaj konforme al la malsamaj sektoroj de la socio kaj familio.

La problemoj de disvolviĝo estis ankaŭ atentata de ĉiuj partoprenantoj. Ili havis kaj samajn kaj malsamajn opiniojn pri plena disvolviĝo de la virinoj en la socio sub la malsamaj cirkonstancoj de diversaj landoj. La reprezentantoj de la disvolviĝantaj landoj opiniis, ke la vivrajtoj de la virinoj estas la plej fundamenta parto de la homaj rajtoj kaj la disvolviĝo signifas altigon de la nivelo en eduko, sanprotekto kaj partopreno de ekonomiaj aferoj.

S-ino Ramos Shahani, ĝenerala sekretario de la Tria Monda Virina Konferenco de UN, diris, ke de post la konferenco en Nairobi multe ŝanĝiĝis la monda situacio. Tio, kio neblis en la pasinteco, nun fareblas. La konferenco en Pekino okazis en plej bona internacia situacio. En la pasinteco temis sole pri egaleco, disvolviĝo kaj paco. Nun la virina movado de la mondo profunde disvolviĝas kaj por tiu ĉi konferenco estis starigita la subtemo: Sano, Eduko, Enoficigo. La programa dokumento "Pekina Deklaracio" antaŭenpuŝos la virinan movadon de la mondo kaj faciligos solvodon de la problemoj de la virinoj. La bela estonteco atendas virinojn de la mondo.

MEJLOŝTONO EN LA HISTORIO DE VIRINOJ DE LA MONDO

Post dusemajna diskutado la partoprenantoj de la konferenco unuvoĉe aprobis en la fermo, kiu okazis la 15-an de septembro 1995, "Pekina Deklaracio" kaj "Platformo de Agado", kun la celo akceli la plenumadon de la Nairobi Strategio. Tio markis, ke la ĉi-foja konferenco gajnis plenan sukceson.

La "Platformo de Agado" konsistas el 6 ĉapitroj: Misia Priskribo, Globa Framo, Gravaj Koncernataj Kampoj, Strategiaj Celoj kaj Agadoj, Institucia Arango kaj Financaj Arangoj. Ĝi taksas la disvolviĝon de la virinoj post aprobo de la Nairobi Strategio en 1985, montras la ekzistantajn obstaklojn kaj difinas la celon kaj agadon en la venontaj 5 jaroj.

Kiel plano por la virina movado de la mondo, la "Platformo de Agado" akcentas la komunajn problemojn de la virinoj solveblajn pere de la kuna penado kaj kunlaboro kun viroj por realigi la celon pri egaleco inter viroj kaj virinoj en ĉiuj partoj de la mondo. La "Platformo de Agado" alte taksas la diversecon de la medioj kaj statoj de la virinoj kaj konfirmas apartajn obstaklojn por doni rajtojn al virinoj. La platformo postulas de diversaj flankoj tuj reagi unuanime: Ĉiuj registaroj, internaciaj organizoj kaj organoj devas doni gravan promeson por efektiviĝi ĉiujn interkonsentojn: Promeson por realigi la egalecon inter viroj kaj virinoj kaj tiun de respondeco, oportuno kaj partopreno kadre de ĉiuj landoj, regionoj kaj internaciaj organoj kaj ilia decido de politikoj kaj ankaŭ por plifortigi la respondecan sistemon pri la virinoj de la mondo.

La "Platformo de Agado" temas pri malriĉeco, eduko, sanprotekto, perforto, milita konflikto kaj aliaj sep gravaj kampoj atentataj en la nuna mondo. Ĝi estas detala kaj programa dokumento por doni rajtojn al la virinoj kaj altigi ilian pozicion.

La "Pekina Deklaracio" per konciza lingvo komunikas la "Platformon de Agado" al la virinoj de la mondo. Ĝi manifestas la promeson kaj garantion de la internacia socio kaj diverslandaj registaroj pri "Platformo de Agado".

S-ino Chen Muhua, prezidanto de la konferenco, diris, ke estas aldonitaj novaj enhavoj al la "Platformo de Agado" kaj "Pekina Deklaracio", kompare kun la rezolucioj aprobitaj en la antaŭaj tri konferencoj. La du dokumentoj ne nur antaŭenpuŝos la virinan aferon en la 20-a jarcento, sed ankaŭ donos gravan influon sur tiu en la 21-a jarcento. Juĝate laŭ la skalo kaj sukcesoj la ĉi-foja konferenco meritas la nomon mejloŝtono en la historio de la virinoj de la mondo.

En la fermo s-ino Gertrude Mongella, ĝenerala sekretario de la Kvara Monda Virina Konferenco de UN, alte taksis "Pekinan Deklaracion" kaj "Platformon de Agado", dirante, ke la dokumentoj simbolas la planon de rajtoj de virinoj, de la novaj promesoj al la virinoj de la mondo kaj de ilia agado. Kun emocio ŝi asertis: "Ni fine sukcesis! Ni ekpaŝu de Pekino por plenumi la 'Platformon de Agado' kaj tenu alte plue la torĉon, kiu estis bruligita en Meksiko kaj transdonita de Kopenhago kaj Nairobi al Pekino!" ■



S-ino Chen Muhua deklaras aprobita la Pekinan Deklaracion.

En la konferenco



Brazila partoprenanto de la forumo montras paperon kun ĉinaj vortoj "Koran dankon al la ĉina popolo".



Diskuto pri rajtoj de virinoj

Ĉinaj kaj alilandaj partoprenantoj



Legado de dokumentoj de la konferenco



Ĉinaj volontuloj en servo





En la malsupra baseno de Huaihe-rivero

Teksto de ZHENG ZHENJIE

Fotoj de DA WEI

DUM la vizitado laŭ Huaihe-rivero mi sentis kaj maltrankvilon pro poluado de la rivero kaj ĝojon pro diversaj konstruaĵoj ĉe la rivero por jungado kaj utiligado de ĝi, inkluzive de ĉiuj kontraŭdiluvaj digoj kun totala longo de 15 000 km.

Mi veturis sur la digo de Yinghe-rivero, branĉo de Huaihe-rivero. La digo altas 13 metrojn kaj ĝia supro larĝas 9 metrojn. Po kelkcenta metro sur la digo kamparano-protektanto akvumis arbojn. Sur ambaŭ deklivoj de la digo kreskas salikoj, poploj, persimonoj kaj vimenoj. Meze de la su-


pro de la digo estas vojo, kaj ambaŭflanke de ĝi kreskas po 5 vicoj da pomarboj aŭ persikarboj. Mi venis al la loko ĝuste en florado de pomarboj. La floroj prezentigis kiel nuboflokoj. Digoprotektanto de Wanggang-vilaĝo diris al mi, ke mi devus veni en aŭtuno, kiam la arboj donas fruktojn kaj fariĝas aparte belaj.

Irante laŭ la digo oni povas atingi Hongze-lagon en la malsupra baseno de la rivero. La lago estas la kvara granda sensala lago de Ĉinio. Ĝia bordo estas masonita el ŝtonpecoj, kaj ĉiu ŝtonpeco estas kubo kun rando longa 40 cm. Mi vidis, ke super la akvolinio estas 11

vicoj da ŝtonpecoj, kaj la aliaj 5-7 vicoj estas sub la linio. Kaj antaŭ la bordo estas alta digo kaj ekster la digo estas arbara zono kun larĝo de 50 metroj. Moderigite de la arbato, la ondoj mildiĝas kaj frakasiĝas sur la ŝtona bordo. Rigardante okcidenten sur la digo, mi vidis, ke en la foro kunfandiĝas la ĉielo kaj la akvo kaj navetas ŝipoj. Nemaleproksime, ĉe la bordo estas retoj por fiŝbredado. Tie mi interparolis kun junulo Tang Wanjiu (Tang Ŭanĝiŭ). Li estis diplomito de kolegio pri akvoproduktaĵoj. Antaŭ kelke da jaroj li prunteprenis monon kaj helpis al siaj gepatroj konstrui du rete apartigitajn spacojn por bredi karpajn, herbokarpajn kaj aliajn fiŝojn. Ĉiujare la familio rikoltis pli ol 1 000 kg. da fiŝoj kaj enspezis 3 000 juanojn. Sed lastatempe poluado multe ĉagrenis la fiŝbredantojn. Tang Wanjiu diris, ke julie de 1994 serioza poluado de la lago venis al li 1 000 kg. da fiŝoj. Ankaŭ aliaj fiŝbredantoj ne povis eskapi de la malfeliĉo.

Sed la alia lago Weishan en la malsupra baseno de la rivero, laŭ mi, estas pura. Ĉe pramejo de la lago mi vidis, ke meze de la lago estas verda insulo, super kiu ŝvebis birdoj. Boate veturante al la insulo, mi vidis, ke sur la akvo glitas multaj boatoj kun kormoranoj, kaj de tempo al tempo la kormoranoj subakviĝis kaj baldaŭ malmergiĝis kun fiŝo en la beko. Rimarkinte mian intereson pri fiŝkaptado de kormoranoj, la maljuna boatisto

SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE HUIAIHE-RIVERO



diris al mi kun suspiro: “Antaŭe la loĝantoj sur la insulo sin vivtenis per fiŝado generacio post generacio. En la sezono de fiŝkaptado sur la lago kolektiĝis multaj ŝipoj. Tiam en la lago vivis tre diversaj specoj da fiŝoj en granda kvanto, kaj unu ŝipo povis kapti 500 kg. da fiŝoj en unu nokto. Sed en la lastaj jaroj malmultiĝis fiŝoj pro poluado kaj senbrida kaptado. Estis detruitaj la ovodemetejoj kaj kreskejoj de fiŝoj. Sekve de tio, multaj fiŝistoj forlasis fiŝkaptadon kaj devis kulturi grenon, fruktojn, kokojn kaj anasojn.

En tiu ĉi numero fermiĝos la rubriko “Reordigo de Huaihe-rivero”. Tamen oni povas diri, ke Ĉinio faris nur la unuajn paŝojn en bridado de poluado de la rivero. Se estos por mi ŝanco, mi informos al vi novan progreson en reordigo de Huaihe-rivero. Mi kredas, ke multaj en la mondo atendas plenan sukceson en reordigo de la rivero.

Ĉe la fino mi volas aldoni, ke forigante poluadon de Huaihe-rivero, la ĉinoj ne devas malstreĉi sian energion por batali kontraŭ la inundo de la rivero.

En la pasintaj 40 jaroj Ĉinio multe penis por jungi Huaihe-riveron, kiu alportis grandan katastrofon en granda pluvo, malgrandan katastrofon en malgranda pluvo kaj sekegecon en senpluva sezono. En ĝia supra parto oni konstruis akvokonservejojn por reteni grundon kaj akvon. En la meza parto oni faris kaj akvokonservadon kaj akvodrenadon. En la malsupra parto oni dragis la enfluejojn de la rivero al Yangzi-rivero kaj la maro, por kiel eble plej rapide ellasi superakvon. Krome, oni ankaŭ konservis akvon en la lagoj por fari irigacion kaj navigadon. Sed en la pasinteco la Flava Rivero plurfoje deviis de sia fluejo kaj entrudiĝis en Huaihe-riveron, kio malordigis la akvosistemon de Huaihe. Tio ne nur katastrofis la popolon ambaŭborde de la rivero, sed ankaŭ malfaciligis kaj komplikis la reordigadon de la rivero. En 1991 eksterordinara diluvo katastrofis la basenon, kie loĝis 50 milionoj da



Konstruantoj de digo

homoj, kaj la perdo superis 34 miliardojn da juanoj.

Ni prenu kiel ekzemplon Hongze-lagon, kiu kovras 2 200 kvadratajn kilometrojn. Dum longa tempo la Flava Rivero entrudiĝis en Huaihe-riveron kaj Hongze-lagon kaj portadis grandan kvanton da sablo en la lagon. Sekve de tio, pli kaj pli altiĝis la fundo de la lago kaj fine la akvo en la lago estas pli alta ol la kampoj ĉirkaŭe je 4-8 metroj, kaj tio minacas la loĝantojn ĉirkaŭ la lago.

Por ke la akvo de Huaihe-rivero glate forfluu kaj por sekurigi la popolon ambaŭborde de la rivero, oni fosis la 170-kilometran Iriga-

cian Kanelon de Norda Jiangsu-provinco, kiu havas ŝipluzojn. Kiam ŝveliĝas Huaihe-rivero, la kanalo forkondukas la akvon en la Flavan Maron. En la malsupra parto de Huaihe-rivero oni fosis la enfluejojn Xinyihe kaj Xinshuhe.

Post la plaga ŝveliĝo de Huaihe-rivero en 1991, la ĉina registaro decidis elspezi 12 miliardojn da juanoj en la venontaj dek jaroj por fari 18 kontraŭdiluvajn konstruaĵojn de Huaihe-rivero. Oni ellaboris pli altan normon por la kontraŭdiluva konstruaĵo de Hongze-lago, por ke ĝi povu gardi la loĝantaron kaj kampojn ĉirkaŭe kontraŭ la ŝveliĝo. ■

Huaiyang-anoj en konstruado de irigacia kanalo

Foto de XU MENG






La digo de Hongze-lago




Fiŝboatoj kun pandionoj
sur Weishan-lago





La dua kluzo de Weishan-lago



Sur Hongze-lago



Fiŝbredistoj observantaj la kreskon de fiŝoj

EN decembro 1994 startis la starigo de la trigorĝa konstruaĵo de Yangzi-rivero de Ĉinio, la plej granda akvoutiliga pivota konstruaĵo en la mondo. La urbo Yichang en la sidejo de la nomita konstruaĵo fariĝis tre atentata de la publiko.

Por la starigo de la trigorĝa konstruaĵo de Yangzi-rivero necesas dekkelkaj jaroj. Multega investo de la ŝtato al la konstruaĵo kaj aparte favoraj politikoj praktikataj en la malfermita ekonomia distrikto ĉe la Tri Gorĝoj de Yangzi-rivero, abundaj naturaj riĉfontoj, bona industria bazo kaj oportuna trafiko, ĉio ĉi faras Yichang nova fokuso de investado en la 9-a jardeko en Ĉinio. Ĉinaj kaj eksterlandaj komercistoj tre interesiĝas pri tio. Iu ĵurnalisto de okcidenta lando, post intervjuo en Yichang, asertis: "Yichang fariĝos la sepa granda speciala ekonomia distrikto de Ĉinio."

Yichang estas urbo kun historio de pli ol 2 000 jaroj, kun areo de 21 000 kvadrataj kilometroj kaj 4 milionoj da loĝantoj.

Yichang situas en la limregiono de la provincoj Sichuan, Hubei kaj Hunan, ĉe loko de kunligiĝo de la supra kaj meza partoj de Yangzi-rivero, kun interplektitaj akvovoj kaj fervojoj, kaj servas kiel grava trafika nodo. Pro siaj naturdotita geografia situo kaj bonaj trafikaj kondiĉoj, Yichang delonge funkcias kiel loko de distribuo de limregionaj produktaĵoj, kiel financa kaj komerca centro kaj kiel havenurbo por eksportataj varoj. En la nuna ekonomia strukturo, Yichang troviĝas ĉe la kunfluejo de la orienta teknologio kaj okcidentaj riĉfontoj, montrante okulfrapajn karakterizaĵojn de geografia supereco.

Tamen la plej granda prospero de Yichang en ĝia 2 000-jara historio okazis de post la 7-a jardeko de la 20-a jarcento, kiam komenciĝis la starigo de la akvoutiliga pivota konstruaĵo Gezhouba (Geĝoŭba).

Nun Yichang havas la bonegan ŝancon sin evolui pli en la starigo de la trigorĝa konstruaĵo de Yangzi-rivero. La konstruaĵo alkroĉiĝas al Yichang,


YI XIU:

Prosperiĝo de antikva urbo ĉe Yangzi-rivero

kaj Yichang prosperiĝas pro la konstruaĵo. La popolo de Yichang, kiel antaŭ dekkelkaj jaroj, kiam ardis tie la konstruado de Gezhouba, refoje energie laboras.

De la lastaj tri jaroj Yichang rekviziciis 1 600 hektarojn da tero kaj setligis siajn 11 300 loĝantojn, kiuj jam estis bone aranĝitaj en diversaj okupoj aŭ ĝuas emeritan asekuron donitan de la registaro; du novaj guberniaj urboj Xingshan (Ŝingŝan) kaj Zigui komencis setligon, interalie pli ol cent projektoj estis enlistigitaj en la kompletigan konstruan planon de diversaj departementoj de la Ŝtata Konsilantaro kaj la provinco Hubei; kaj nombro da bazoj de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj servantaj al la trigorĝa konstruaĵo estas grandskale konstruataj. Iuj trafikaj, telekomunikaj kaj aliaj gravaj projektoj estis plenumitaj aŭ plenumataj, inkluzive de 100 000 programregataj telefonoj ekfunkciantaj unu post alia, tri ŝoseoj lanĉitaj aŭ plilarĝigitaj, kaj gasduktoj

La haveno de Yichang





Parto de Yichang

kondukantaj al miloj kaj miloj da familioj. Pli rapidiĝas la konstruado de sinteza transporta reto el akvovojoj, ŝoseoj, fervojoj kaj aerlinioj. Malfermiĝis akvolinio inter Yichang kaj Hongkong, konstruiĝas internacia flughaveno en Yichang, kiu prove ekfunkcios en la jarfino de 1995, kaj ankaŭ la dogana domo de la urbo estos baldaŭ inaŭgurita.

En majo 1992 la ĉina registaro alvokis al la tuta lando helpi Yichang kaj la trigorĝan akvorezervejan regionon. Responde al tio, help-celaj kaj invest-esploraj delegacioj el 16 provincoj kaj municipoj venis sinsekve al Yichang, kaj multaj el tiuj starigis agentejon en Yichang. 45 fakoj de ministerioj, komisionoj kaj diversaj provincoj kaj municipoj establis helpajn rilatojn kun Yichang.

En septembro 1994 la Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio sankciis Yichang kiel malfermitan ĉeriveran ur-

bon, sankciis ankaŭ starigi la ekonomian ekspluatan distrikton de la Tri Gorgoj de Yangzi-rivero, inkluzive de Yichang kaj aliaj 16 urboj kaj gubernioj en la akvorezerveja regiono. Sekvas serio da aparte favoraj politikoj, kaj tio kreis bonajn kondiĉojn por la ekonomia disvolviĝo de Yichang.

De 1992 aro da kompanioj investitaj de eksterlandanoj fondiĝis unu post alia en Yichang. Tie nun ekzistas pli ol 500 entreprenoj kune investitaj aŭ funkciigataj de ĉinoj kaj eksterlandanoj, kun totala investa sumo de 1.27 miliardoj da usonaj dolaroj. Sub la ŝtata makroreguligado la ekonomia konstruado de la urbo iras bone.

Ankaŭ en- kaj eksterlandaj financaj institucioj montras grandan interesigon pri Yichang. Diversaj enlandaj financaj institucioj konkure starigas filion en la urbo. Krome, ankaŭ delegitoj de la Akcia Kompanio Marine kaj la Investa Kompanio Morgen Stanly de Usono kaj iu japana banko venis sinsekve al Yichang kaj esprimis deziron starigi agentejon kaj kunlabori kun la urbo.

Oportune al procedo de sankcio al la investaj petoj de eksterlandaj entreprenistoj, Yichang antaŭlonge starigis specialan institucion por komplete servi al la investantoj kaj multe altigis la labor-efikon. Tio estas laŭdata de ĉinaj kaj eksterlandaj entreprenistoj.

Dank' al ĉio ĉi, la ekonomio de Yichang disvolviĝas pli rapide ol tiu en multaj aliaj lokoj de Ĉinio.


Situante ĉe la trigorĝa konstruaĵo de Yangzi-rivero, Yichang ricevas multe da kapitaloj, materialoj, teknikoj, talentuloj kaj informoj. Dum la konstrua periodo ĉiujare pli ol 5 miliardoj da juanoj fluos al Yichang. Ĉio ĉi metas bazon por ankoraŭ pli granda prospero de Yichang.

En la urbo altaj domegoj leviĝas unu apud alia kaj novaj entreprenoj ekfunkcias unu post alia. La urbo marŝas al moderniĝo per solidaj paŝoj. ■

La konstruejo de la trigorĝa akvorezerveja regiono



Parto de Langzhong



FAMAJ URBOJ

En antikva urbo Langzhong

Teksto kaj fotoj de HAN HONG

La Stel-rigarda Turo



Brika skulptaĵo sur muro



INDEKSO DE EPC 1995

| | Nr. pĝ. | | Nr. pĝ. |
|--|---------|--|---------|
| POLITIKO | | | |
| Virinoj, konsilistinoj pri ŝtataj aferoj | 7.36 | Regiono sopirata | 7.20 |
| Rememoro por la paco | 8.04 | REORDIGO DE HUAIHE-RIVERO | |
| Kunlaboro inter Ĉinio kaj UN | 10.04 | Ĉe la fonto de Huaihe-rivero | 8.20 |
| | | Pura rivero atendata | 9.20 |
| | | Huaihe-rivero en kontraŭpoluado | 10.20 |
| | | Fruktoj de kontraŭpoluado | 11.20 |
| | | En la malsupra baseno de Huaihe-rivero | 12.20 |
| EKONOMIO | | KULTURO, EDUKO, SCIENCO KAJ TEKNIKO | |
| Ĉe Tenger-dezerto | 1.28 | La kultura strato Liulichang | 1.17 |
| Urbeto — elekto de ĉinaj kamparanoj | 1.32 | Esploro pri incendio | 1.24 |
| Por bonhaviĝo de kamparanoj | 2.08 | Por aŭtismaj steloj | 1.44 |
| Pri la ĉina mono <i>Renminbi</i> | 2.40 | En la dezerto Taklimakan | 3.06 |
| Gansu: rakontoj pri akvo | 3.08 | Operaciante de molekulo | 3.37 |
| La urboj plipuriĝu! | 4.04 | Ĉinaj studentoj iras al la socio | 4.32 |
| Ĝardeneska vilaĝo | 4.06 | Agrikultura ekologia eksperimento sur la Qinghai-Tibeta | |
| La distingiga Giganta Grupo | 4.08 | Altebenajo | 5.36 |
| Kemi-industria urbo sur alkala marĉo | 5.45 | Kreinto de pigra kotono | 6.28 |
| 16 jaroj de la Baoshan-a Ŝtala Kompanio | 6.32 | Transjarcenta reformado en altaj lernejoj de Ĉinio | 7.04 |
| Aktinidiodoj | 8.28 | Ĉina Internacia Eldona Grupo | 7.06 |
| Hejmloko de perloj en Ĉinio | 8.35 | Pioniroj de la ĉina aero- kaj kosmonaŭtika afero | 8.08 |
| Kamparano kaj lia aligatorejo | 8.44 | Vestoj kaj la Malpermesita Urbo | 8.37 |
| Vizito al la 3-a Lanteksejo de Interna Mongolio | 9.24 | Xurigan, filo de la stepo | 9.38 |
| La oceana fiŝado de Ĉinio en disvolviĝo | 9.28 | Vivo de semokulturisto | 10.38 |
| Ĉu ĉinoj povos vivteni sin? | 10.24 | Feliĉo de lernantoj en valetoj | 11.28 |
| Hebei malfermis sian pordon | 10.32 | Pri la naturparko Shennongjia | 11.32 |
| Nova industria urbo Xiangfan | 10.44 | Blinduloj adiaŭu mallumon | 12.43 |
| Vizito en norda Henan-provinco | 11.06 | La somera tendumo en la monto Koko | 12.46 |
| Fenikso benas vin | 11.46 | ĈINA KULTURO | |
| Prosperiĝo de antikva urbo ĉe Yangzi-rivero | 12.24 | Teatro pri diservo kaj demon-ekzorco | 1.42 |
| Montanoj penas por nova celo | 12.40 | Ŝipfarado en la antikva Ĉinio | 3.42 |
| EKONOMIE | | Antikvaj ĉinaj pontoj | 5.58 |
| Por stabiligi prezaron | 1.05 | Ĉu la ĉina lingvo malfacila? (I) | 7.32 |
| Post reformado de la sistemo de ter-dispono | 3.40 | Ĉu la ĉina lingvo malfacila? (II) | 8.38 |
| Perspektivo de la personaŭta industrio de Ĉinio | 5.44 | Pri Cizhou-bakuloj | 9.40 |
| Por elliberigi sin el malriĉeco | 7.17 | Historio de ĉinaj kostumoj | 11.38 |
| Manko de elektro | 9.32 | | |
| Ĉinio, komencanto de reklamado | 11.24 | | |
| REGIONO ĈIRKAŬ BOHAI-MARO | | | |
| Nova ekonomia distrikto en konstruado | 1.20 | | |
| Reto de tervojtoj kaj marvojtoj | 2.20 | | |
| Naturdotita energia bazo | 3.20 | | |
| Ekspluataj distriktoj — lokoj ŝatataj de eksterlandanoj por investado | 4.20 | | |
| Adiaŭ al la malnova sistemo | 5.28 | | |
| Mara ekonomio disvolviĝanta | 6.20 | | |
| | | SPORTO KAJ HIGIENO | |
| | | En lando de drogherboj | 1.36 |
| | | Ĉin-medicina kuracisto Zeng Xiaoping | 1.40 |
| | | Eminenta gimnastino Mo Huilan | 2.06 |
| | | La lasta amo | 3.24 |

| | Nr. pĝ. | | Nr. pĝ. |
|--|---------|---|---------|
| Junaj ĉinaj piedpilkistoj en Brazilo | 3.41 | Intima najbareco | 7.42 |
| Ĉinio en batalo kontraŭ aideso | 4.36 | Refoja enoficiĝo de virinoj | 11.44 |
| Gimnastiloj en hejmo de ordinaraj ĉinoj | 4.49 | Direktoro el kamparano | 12.42 |
| Ĉina medicino servas al eksterlandanoj | 5.52 | Familioj en profundo de dezerto | 12.44 |
| Sportemaj Zibo-anoj | 5.62 | FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO | |
| Asekuro por sano de infanoj | 6.07 | Por dispeli solecon | 2.36 |
| Ĉina tenisisto Xia Jiaping | 6.48 | Hundoj en la nuna Ĉinio | 4.40 |
| La Pekina Urĝa Medicina Centro | 7.40 | Pri la publika moralo en Ĉinio | 6.42 |
| Pri la ĉinaj gimnastikaj teamoj | 7.44 | Bombasto kaj honesto | 8.24 |
| Nova rimedo por kuraci encefalo- kaj | | Voĉo por malpermeso de fumado | 10.36 |
| kardio-vaskulan malsanon | 8.47 | Amo de maljunuloj | 12.49 |
| Tabloteniso refoje impetas en Ĉinio | 9.42 | VIRINOJ KAJ INFANOJ | |
| Batalo kontraŭ jodomanko | 9.49 | Vasta tereno por agado de la ĉinaj virinoj | 1.06 |
| “Rekonstruo” de homoj | 10.40 | Por ke knabinetoj reakiru ŝancon de lernado | 5.56 |
| Por ke ĉiuj estu sanaj | 11.04 | Mi kaj mia termolinio | 7.38 |
| Savanto de sango-malsanuloj | 11.43 | Inventistino Wang Lianxiang | 9.04 |
| POR VIA SANO | | | |
| Masaĝo en la ĉiutaga vivo (III) | 2.45 | NACIOJ KAJ RELIGIOJ | |
| Masaĝo en la ĉiutaga vivo (IV) | 4.28 | | |
| Masaĝo en la ĉiutaga vivo (V) | 6.41 | Kontakto kun tibetanoj | 3.44 |
| Masaĝo en la ĉiutaga vivo (VI) | 8.46 | Tibetanoj pri Tibeto | 7.24 |
| Masaĝo en la ĉiutaga vivo (VII) | 10.48 | Kulto de oboj | 7.28 |
| Masaĝo en la ĉiutaga vivo (VIII) | 12.48 | Hodiaŭaj tibetaj virinoj | 9.06 |
| LITERATURO KAJ ARTO | | MULTNACIA ĈINIO | |
| | | Ĉiuj nacioj frate vivas | 2.04 |
| Simfonia muziko ĉe Huangpu-rivero | 2.44 | Loĝantara kresko kaj naskolimigo ĉe la | |
| Surdamuta baletistino kaj ŝia instruistino | 3.49 | nacimalplimulto de Ĉinio | 4.38 |
| Denove sonis la voĉo de Volgo | 5.50 | De surlignaj signoj al moderna edukado | 6.36 |
| Karikaturisto Ding Cong | 5.54 | Pri religia kredo de ĉinaj naciminoritatoj | 8.32 |
| Ĉina buksoskulpturo | 9.36 | Originalaj lingvoj de ĉinaj | |
| Patro de ĉina moderna pentrarto | 10.15 | nacimalplimulto | 10.42 |
| La unua ĉina ludantino de | | Originalaj naciaj moroj de Ĉinio | 12.28 |
| perkutinstrumentoj | 11.40 | | |
| 90 jaroj de ĉinaj filmoj | 12.04 | VOJAĜO KAJ VIDINDAJ LOKOJ | |
| La patro kaj filo enmigrintaj (Novelo) | 2.47 | | |
| Homo kaj lupoj sur dezerto (Novelo) | 6.38 | Vojaĝo al la naskiĝloko de Laozi | 2.38 |
| La ŝipisto sur Zijiang-rivero (Novelo) | 9.44 | En naciaj vilaĝoj de Pekino | 3.34 |
| Ĉagreno de spikumanta knabino (Prozaĵo) | 4.44 | Kvar mirindaĵoj de Tuanshan-monto | 4.42 |
| Ni estas okulparo (Poemo) | 7.49 | Impreso pri Jiaying | 6.46 |
| Pluveroj (Poemo) | 7.49 | Vojaĝo al la Tri Gorgoj de Yangzi-rivero | 6.49 |
| Du poemoj | 11.37 | Vojaĝo sur Lancang-Mekongo | 8.42 |
| | | La Bovida Fortreso sur montosupro | 9.33 |
| SOCIA VIVO | | | |
| | | ANTIKVAĴOJ KAJ ARKEOLOGIO | |
| Luktado de Lu Xun | 1.46 | | |
| Stratetoj en Pekino | 1.49 | “Malgranda imperiestra palaco” en la | |
| Geedzoj kaj domlaboroj | 3.04 | okcidenta Pekino | 2.32 |
| Kiam ŝi maljuniĝis... | 4.18 | Grava historia laboro | 4.24 |
| Sub la standardo de “Junaj Volontuloj” | 5.46 | Por esplori spurojn de la homaro en la | |
| Muzikludo sur la vangoj | 5.49 | ŝtonepoko | 5.60 |
| Hardi sin en malfaciloj | 6.04 | Sur la ruino de la primitiva vilaĝo Banpo | 8.40 |

INTERNACIAJ AFEROJ KAJ AMIKAJ KONTAKTOJ

| | |
|---|-------|
| Penado por limigi la loĝantaron sur la tero | 2.25 |
| Ĉina tombejo en Jemeno | 3.46 |
| Nova azi-eŭropa kontinenta ponto | 5.40 |
| Festo por la virinoj | 12.15 |

ESPERANTO

| | |
|---|-------|
| Intervjuo al vicprezidantoj de TEJO | 1.08 |
| Ye Laishi en memoro | 1.12 |
| Migra Esperanto-ekspozicio pri historio pruntebla | 1.12 |
| Intervjuo kun Saionji Masayuki, doktoro de Yumeiho-terapio | 4.15 |
| Intervjuo kun redaktoro de "Esperanto" | 4.16 |
| Gratulon al vi, d-ro Reinhard Selten | 5.24 |
| Tampereoj kaj Sankt-Peterburgo, ĉi-jaraj kongresurboj | 6.09 |
| Saluton, "El Popola Ĉinio"! | 7.14 |
| Nova dimensio en Esperantio | 7.43 |
| Intervjuo kun la ĉefrolulo de "Hejmsopira Stelo" | 9.14 |
| Esperanto — paco — solidaro | 10.12 |
| Riĉa kaj brila kongreso | 11.16 |
| Junularo kaj Esperanto | 12.06 |
| Esperantistinoj en NRO-forumo | 12.35 |
| VOĈO DE E-ISTOJ | |
| Mia unu tago | 2.11 |
| Erara uzo de -iĝ | 4.25 |
| Komunikado, lingvo kaj la 4-a Monda Virina Konferenco | 5.32 |
| Miaj tri vojaĝoj en Ĉinio | 7.08 |
| Vojaĝo en Tibeto | 9.10 |
| Kvin-pinta stelo de Esperanto; Diskuto pri lingvo | 11.08 |
| ĈINAJ E-ISTOJ | |
| Esperanta Bovo | 1.14 |
| Esperantologo, mentoro kaj tradukisto Li Shijun | 2.14 |
| Nia Bakin, nia lingvo | 3.16 |
| La Esperanta disaŭdigo de Ĉinio estu aŭskultata pli vaste | 4.10 |
| Li ĉiam staras en la antaŭa vico de E-movado | 5.20 |
| Chen Shide — mentoro eterna | 6.10 |
| Esperanto-kariero de poŝtisto | 7.10 |
| Li Sen kaj E-movado de Interna Mongolio | 8.12 |
| Dank' al Esperanto ŝi vivas feliĉe | 9.12 |
| E-filatelisto Song Shengtan | 10.07 |
| Ye Junjian, veterana esperantisto, fama tradukisto kaj verkisto | 11.10 |

| | |
|-------------------------------------|-------|
| Ordinara samideano Ivan Ko | 12.10 |
| ORIGINALE VERKITAJ | |
| La portreto | 1.10 |
| Musoj kunsidas | 3.12 |
| La komprenema kiso | 6.14 |
| Paco en mondo | 8.10 |
| La deveno de pano | 10.10 |
| La morto de Paco | 12.08 |
| POR KOMENCANTOJ | |
| Paradizo de pego | 1.13 |
| Ne ĉiu mensogo estas kulpo | 2.10 |
| Antaŭ ol fari stultaĵon | 3.13 |
| Serĉi perditan kamelon | 4.09 |
| Por varmigi ilian koron | 5.48 |
| Lampo en mallumo | 6.16 |
| Ellernu memamon | 7.16 |
| Cikonio kaj najtingalo | 8.15 |
| "Mi tion faris por vi!" | 9.08 |
| Amo | 10.28 |
| Kiu estas pli saĝa? | 11.15 |
| Maltrafo de policanoj | 12.14 |
| SUR NIA LIBROBRETO | |
| Amo en tempo de ftizo | 3.28 |
| Ĉiu silabo aludoplenas | 8.14 |
| Pri la historio de la ĉina ceramiko | 10.49 |
| ESP-NOVAĴOJ | 1-12 |

ALIAJ ASPEKTOJ

| | |
|--|-------|
| Novjara saluto | 1.04 |
| Helpo de legantoj | 3.47 |
| 45-JARA JUBILEO DE EPC | |
| EPC hieraŭ kaj hodiaŭ | 5.04 |
| Varmaj gratuloj | 5.06 |
| Gratulaj skriboj de Lu Jiayi, Hu Sheng, Bakin kaj Zhou Guangzhao | 5.08 |
| Ni povos helpi plenigi tiun vakan spacon | 5.15 |
| EPC kaj mi | 5.16 |
| 45 ne estas magia cifero | 5.17 |
| De l' Arĝenta al la Ora | 5.18 |
| La kvina konkurso de EPC-legado finita | 7.15 |
| Renkontiĝo ĉe la 45-jara jubileo de EPC | 9.16 |
| BELECO DE ĈINIO | |
| Arto de homa piramido en Shexian | 1.29 |
| Sublimaj montoj en Ĉinio | 2.29 |
| En urbeto de jadaj skulptaĵoj | 3.29 |
| Belaj pagodoj en Ĉinio | 4.29 |
| Arta trezorejo sur la monda tegmento | 5.37 |
| Ĉarmo el plektaĵoj de tritika pajlo | 6.25 |
| Muzeo de Antikvaj Sonoriloj | 7.29 |
| Budha paradizo en la Oriento | 8.29 |
| Pri la antikva Turo de Princo Teng | 9.29 |
| Gustoplena novjara bildo de Mianzhu | 10.29 |

| | Nr. pĝ. | | Nr. pĝ. |
|--|---------|--|---------|
| Pentraĵoj en flakonoj | 11.29 | Febra lernado de aŭtostirado en Pekino | 7.18 |
| Familio de aktoroj-kampanoj | 12.30 | Nodo-farado | 7.35 |
| EL ĈINAJ GAZETOJ | 1-12 | Memorinda loko | 8.18 |
| INTER NI | 1-12 | Anĵi, gubernio de bambuoj | 9.35 |
| KURANTAJ AFEROJ | 1-12 | En la momento de hiso de ĉina nacia flago | 10.35 |
| SUR LA KOVRILO | | FAMAJ URBOJ | |
| Lahu-aj virinoj en festotago | 1 | Urbo de fontoj | 2.26 |
| Aŭtomata transŝarĝa sistemo de karbo en | | Vidindaĵoj en Zhenjiang | 4.27 |
| Qianwan-haveno de Qingdao | 2 | Hancheng, "Muzeo de Antikva Arkitekturo" | 6.30 |
| S-ro Bakin kaj liaj familianoj | 3 | Porcelana urbo Jingdezhen | 8.26 |
| Ji-a knabino | 4 | Handan, urbo de antikva kulturo | 10.26 |
| Peonio | 5 | En antikva urbo Langzhong | 12.26 |
| Malgranda aktorino | 6 | ĜENROJ DE NACIMALPLIMULTOJ | |
| Tibeta knabino | 7 | Lahuoj en montaroj | 1.26 |
| S-ro Zeng Shandong en skulptado el porcelano | 8 | Sur stepo de la Interna Mongolio | 3.26 |
| S-ro Chen Yuan, prezidanto de ĈEL, kaj junaj | | Buji-nacianoj sub ardezoj | 5.34 |
| esperantistoj dum la te-kunveno por la 45-jara | | Ji-nacio, adoranto de fajro | 7.26 |
| jubileo de EPC | 9 | Pie antaŭ Namco, sankta lago sur la | |
| Dancistino | 10 | monda tegmento | 9.26 |
| Ĝuang-a knabino en la festivalo de kantoj | 11 | Ĝuang-nacia festivalo de kantoj | 11.25 |
| Partoprenantoj de la Kvara Monda Virina Kon- | | GALERIO | |
| ferenco sur la Granda Muro | 12 | Kruĉo kun supro simila al homa kapo | 1.50 |
| FOTOJ INTERNE DE LA KOVRILO | | Pentraĵo "Pri Diino de Luoshui-rivero" | 2.50 |
| En plena florado | 1 | Elefanta vinkruĉo | 3.50 |
| Rokoj en maro | 2 | Pentraĵo "Kvin Bovoj" | 4.50 |
| Floroj en vintro | 3 | Drako skulptita el jado | 5.66 |
| Matena fiŝhokado | 4 | "Montoj kaj Rivero en Mil Li-oj" | 6.50 |
| Reflugo en vespero | 5 | Trikolora tombogarda besto | 7.50 |
| Kolora ŝtono kun vejnoj | 6 | "Fruktobranĉo kaj Birdeto" | 8.50 |
| Konvolvulo | 7 | Kantanta pupo el argilo | 9.50 |
| Abelo sur floro | 8 | Pentraĵo "Aŭskultado de Muzikoludo" | 10.50 |
| Dezerto ĉe sunsubiro | 9 | Bodisatva statuoj el blanka marmoro | 11.50 |
| Stalaktitoj | 10 | "Nokta Amuzado de Han Xizai" | 12.50 |
| En mateno | 11 | SUR LA DORSKOVRILO | |
| Sur burĝono | 12 | La Okcidenta Lago en printempo | 4 |
| BILDOSERIOJ | | Verda Monto (Ĉinstila pentraĵo) | 5 |
| Nova industria urbo Linhai | 1.34 | Pagodo en Xishuangbanna | 7 |
| Kultura vivo de kampanoj | 2.18 | Jiayuguang-pasejo, la okcidenta fino de | |
| Lulilo de nacimalplimultaj fakuloj | 2.34 | la Granda Muro | 8 |
| Placo kun kolomboj en Dalian | 3.10 | Bondeziroj al la 45-jariĝo de EPC | |
| La budhisma monto Putuo | 4.34 | (Ĉinstila pentraĵo) | 9 |
| Feriado de EPC-anoj | 5.26 | Galopo (Ĉinstila pentraĵo) | 10 |
| Brokatoj de Nankino | 5.43 | Denove rubriko pri la Silka Vojo, sed la Norda | 11 |
| Ensemblo de Lantian-infanĝardeno | 6.18 | Denove rubriko pri la Silka Vojo, sed la Norda | 12 |
| Ekskurso en stratetoj de Pekino | 6.35 | ĈINAJ POŝTMARKOJ | |
| | | Famaj porcelanaĵoj kaj skulptaĵoj | 2 |
| | | Rododendro | 3 |
| | | Bambuo | 6 |
| | | FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ | |
| | | Lago ĉe Sĵohaga | 1 |
| | | Tipa sveda grandbieno | 1 |



La statuo de Ŝakjamunio en kaverno


En norda Sichuan-provinco estas antikva urbo ĉirkaŭita de zigzaga Jialing(Ĝjaling)-rivero en tri flankoj. Ĝi estas Langzhong (Langgong), tre fama urbo en la historio de Ĉinio.

Antaŭ pli ol 2 000 jaroj Langzhong jam estis la ĉefurbo de Ba-regno. En la supra baseno de la rivero estis regnoj en la nunaj provincoj Shaanxi (Ŝenŝji) kaj Gansu, kaj malsupre estas Yangzi, la plej longa rivero en Ĉinio. Langzhong estis intertuŝiĝa loko inter la izolita kaj subevoluinta loko kaj la progresita kaj disvolviĝinta loko. Pro tio Langzhong estis tre grava en la pasintaj dinastioj por praktiki regadon super la sudokcidenta regiono de Ĉinio.

Longa historio heredigis al Langzhong multajn

antikvajn konstruaĵojn. Nun oni povas vidi la imponan Yong'an-templon konstruitan antaŭ pli ol 1 000 jaroj, la templon de Avalokitesvaro kaj la templon de Zhang Fei (Ĝang Fej), tre fama generalo antaŭ 1 700 jaroj. Krome tie estas ankaŭ kaverno kun statuo de Ŝakjamunio farita en Tang-dinastio kaj gravuritaj steleoj de Tang-kaj Song-dinastioj. Oni povas vidi ankaŭ grandiozan Huaguang-pavilonon kaj Papa-moskeon. Kontraste kun tiuj antikvaj konstruaĵoj, estas impresaj la malnovaj popolaj loĝejoj. Ĉu stratoj, ĉu stratetoj, ĉiuj estas en bona ordo kiel ŝaktabulo. Tie estas kvartalo de centoj da malnovaj domoj bone konservataj. Sur la domoj estas delikate skulptitaj ornamaĵoj montrantaj la altan teknikon de metiistoj antaŭ centoj da jaroj.

Popola loĝejo



Originalaj naciaj moroj de Ĉinio

de CHEN LEQI

LA 55 ĉinaj nacimalplimulto havas ĉiu siajn proprajn morojn kaj kutimojn pro malsamaj natur-medioj kaj materiaj kondiĉoj, ekonomia malekvilibro kaj malsamaj procedoj de evoluado de la socia historio. Ankaŭ ĉiu nacimalplimulto havas morojn kaj kutimojn diferencajn en malsamaj lokoj. Iaj moroj kaj kutimoj strikte ligiĝas kun la religia kredo. Ekz. iuj religioj havas siajn apartajn regulojn pri geedziĝo, funebro, manĝo k.a. kiuj iom post iom ŝanĝiĝis en naciajn morojn kaj kutimojn.

Tiuj moroj kaj kutimoj vidiĝas en la materia kaj spirita vivo, kiaj produktado, loĝado, manĝado, vestoj, geedziĝo, funebro, festado, amuzado kaj etiketoj.

Manĝoj de diversaj nacimalplimulto estas tute malsamaj. Ekz. hujoj, ujuguroj, kazaĥoj, kirgizoj, taĝikoj, uzbekoj, tataroj, dongŝjangoj, salaroj kaj baŭanoj tabuas la manĝadon de porkaĵo, hundaĵo, azenaĵo, mulaĵo kaj viando de mortintaj birdoj kaj bestoj kaj trinkadon de sango de animaloj. La tibetanoj tabuas la manĝadon de fiŝoj, manĉuroj — hundaĵo kaj mongoloj — kraboj, salikokoj kaj aliaj marproduktoj.

Estas ankaŭ malsamaj la ĉetablaj etiketoj. Ĉe kazaĥa tablo la gastiganto certe proponas al la gastoj pladon kun ŝafkapo por

esprimi sian respekton. Kaj la gasto tranĉas pecon da viando de sur la dekstra vango de la ŝafkapo kaj metas ĝin en sian teleron por esprimi sian dankon, kaj detranĉas ĝian orelon, donas ĝin al la plej juna ĉe la tablo kaj redonas la ŝafkapon al la gastiganto. Ĉe kirgiza tablo la gastiganto unue manĝigas al la gastoj oleon de ŝafvosto kaj poste skapolan kaj kapan viandon de ŝafo. Tiam la gastoj devas unue doni iom da viando al la virinoj kaj infanoj de la gastiganto. Oni devas restigi en la telero iomete da aliaj manĝaĵoj por montri la abundecon de la pladoj.

Pro malsamaj geografiaj medioj, okupoj kaj estetikoj de la nacimalplimulto, iliaj kostumoj estas diferencaj. Mongoloj, loĝantaj en la Nordo kaj longtempe okupitaj pri paŝtado, ŝatas porti robon kaj botojn. La mongolaj viroj portas ĉapon sur la kapo kaj virinoj turbanon, dum la mjaŭoj, dongoj, jaŭoj, jioj k.a. loĝas en la Sudo kaj longtempe okupiĝas pri kamplaboro. Iliaj viroj sin vestas per lozaj kostumo, pantalono kaj kaptuko, dum la virinoj per longa brodita jupo, plisita jupo aŭ pantaloneto kaj ornamas sin per arĝentaj krono, koliero, braceletoj k.a. Kostumoj de ĉiu nacio ja estas malsamaj, ekz. la kostumoj de mjaŭoj kaj jioj estas kelkdek- kaj eĉ centspe-

caj.

Krom sia jarfesto la ĉinaj nacimalplimulto havas ankaŭ ĉiu siajn tradiciajn festojn. Iuj eĉ havas cent festojn jare, inter kiuj estas ankaŭ religiaj. La hujoj kaj aliaj nacimalplimulto kredantaj je islamo havas la Fasto-rompan Feston, Korban-feston kaj Feston de Mawlid al-Nabi kiel sianaciajn festojn. La tibetanoj — Ĉuangŭo-feston kaj Budhosunuman Feston. La mjaŭoj festas la 8-an de la kvara monato laŭ la luna kalendaro, tajoj — la Akvoverŝan Feston, jaŭoj — “Tanlebaĵ”-feston, ŝibooj — la feston de Dujinbaĵ kaj Zhakun k.a. por kulti la prapatrojn kaj memori pri la martiroj. Ŭangŭo-festo de tibetanoj, Torĉa Festo de jioj, Freŝaj-gustuma Festo de dongoj kaj Novriza Festo de lahuoj estas festataj por preĝi por riĉa rikolto aŭ celebri ĝin. Iuj festoj portas sportan koloron, kiaj la Nadamu-festivalo de mongoloj, Petard-festo de dongoj, Dŭan-festo de ŝuoj kaj Daogan-festo de lisuoj. Ĉe iuj nacimalplimulto estas am-festo por gejunuloj, kiaj la Kantofesto de ĝuangoj, dongoj kaj jaŭoj, Cajiĥaŝan-festo kaj Luŝeng-festo de mjaŭoj, Pordomalferma Festo de tajoj, Munaŭ-festo de ĝingpooj kaj Ĉabaj-kantofesto de bujioj.

La supre menciitaj festoj plejparte devenis de belaj legendoj. Ni prenu la Akvoverŝan Feston kiel ekzemplon. Laŭdire, antaŭ pli ol 1 600 jaroj diablo venis al vilaĝo de tajoj kaj ordonis, ke la vilaĝestro ĉiutage sendu al ĝi unu knabinon, se ne, ĝi ruinigos la vilaĝon. Brava kaj bela knabino Minzi memvole venis al ĝi. Ŝi ĉiamaniere penis plaĉi al la diablo kaj sciigis de la ebria diablo pri la rimedo por mortigi ĝin. Minzi kaj aliaj 48 knabinoj, kiuj estis senditaj al ĝi antaŭ ŝi, kune senkapigis la diablon. Sed ĉie, kie la kapo ruliĝis, estiĝis brulego. En la kriza momento Minzi sa-

gace prenis la sangantan kapon. Kaj tiamaniere la 49 knabinoj alterne ĉirkaŭprenis la diablan kapon kaj ĝi ĉesis sangi kaj bruli post 49 tagoj. La diablo finfine fiaskis. Tamen la 49 knabinoj estis plene sangmakulitaj. Por forigi la sangmakulojn de la knabinoj, oni verŝis sur ilin akvon. De tiam tajoj festas la Akvoverŝan Feston en la lasta tagdeko de aprilo ĉiujare.

Ordinare la ĉinaj nacimalplimulto praktikas fruan geedziĝon. Kiam la jiaj knabinoj atingas 16-17 jarojn, iliaj gepatroj jam komencis aranĝi ilian edziĝon. La gepatroj elektas favoran tagon, invitas parencojn kaj amikojn de la vilaĝo, buĉas porkon kaj ŝafon kaj okazigas jupoŝanĝan ceremonion. Pliiĝa virino faras al la fianĉino du harplektaĵojn kun harfranĝoj sur la frunto, metas al ŝi orelingojn kaj vestas ŝin per plisita jupo en la koloroj ruĝa, blua kaj nigra. Ĉio ĉi simbolas, ke la knabino jam plenkreskis. La gepatroj de la fianĉo aranĝas ceremonion apartan al jioj, en kiu ili ĉefe regalias gastojn per supo. Tio estas nemankigebla etiketo por jiaj gefianĉoj antaŭ ilia geedziĝo. Sen tiu ceremonio la gepatroj kaj parencoj de la fianĉino ne rekonas ilian geedziĝon kaj ankaŭ la knabino hontas antaŭ aliaj.

Influante de religioj kaj tradicia koncepto, la nacimalplimultoj traktas kadavron per malsamaj manieroj: entombiga, kremacia, akva, ĉiela, venta kaj arba sepultoj.

Nacimalplimultanoj havas profundan senton al sianaciaj moroj kaj kutimoj. Ili rigardas alies respekton al iliaj moroj kaj kutimoj kiel tiun al ilia tuta nacio. Tial, respekti morojn kaj kutimojn de nacimalplimultoj estas grava konsistiga parto de la nacimalplimultaj politikoj de la registaro kaj grava enhavo de egalrajteco kaj unueco de la nacioj.



Tuĝja-aj gejunuloj en naciaj kostumoj

La konstitucio de Ĉinio klare difinas, ke ĉiuj nacioj “estu liberaj konservi siajn morojn kaj kutimojn kaj ŝanĝi ilin.” “La ŝtato garantias la laŭleĝajn rajtojn kaj interesojn de ĉiuj nacimalplimultoj, gardas kaj disvolvas egalecon, unuigon kaj interhelpon inter diversaj nacimalplimultoj. Estas malpermesite diskriminacii kontraŭ la nacimalplimultoj, subpremi ilin kaj malpermesite detruigi nacian unuigon kaj fari displitiĝon inter la nacimalplimultoj.”

La ĉina registaro publikigis

Tibetaj virinoj prezentas sekalvinon pro riĉa rikolto.



Familio de aktoroj-kampanoj

Teksto de PANG NAIYING

Fotoj de HAN HONG

KVIETECO regis en Dengwan-vilaĝo. Anseroj naĝis en akvo, ŝafoj sin paŝtis kaj bubaloj vidigis siajn naztruojn kaj kornojn sur la surfaco de lageto.

Subite eksonis tamburado kaj gongado. Ĉe tio alvenis vilaĝanoj. Oni ŝtopis la pordon de la familio Yuan. 67-jara Yuan Shouxiang (Jūan Ŝouŝjang), liaj filinoj kaj

bofilinoj estis sin alivestantaj.

Ĉiu membro de la familio havas oran voĉon. Siatempe la avo de Yuan Shouxiang estis gvidanto de teatro de *huagu*-opero, furoranta en Fengyang de la provinco Anhui, kiu limtuŝas Dengwan-vilaĝon sudoriente de Henan-provinco. Sed fakte, la patro de Yuan Shouxiang kaj liaj familianoj jam komencis ludi *ĉjuĝju*-operon, furorantan en Henan.

Infanoj interesiĝas pri ŝminkado.





Yuan Shouxiang ĉiam estas serioza.



Malgrandaj aktoroj antaŭ prezentado

Prezentado sur draŝejo



*Hej --, mi sesdektri-jara
sed aspektas juna
por la grupo komuna
mi do juras la karan...*

Kantante, Yuan diris, ke ĝi estas *hej*-opero kun melodio tradicia kaj teksto mem verkita. Ofte okazas, ke kun preta melodio en la koro li improvizas tekston kaj kantas ĝin, laborante surkampe aŭ promenante surstrate.

Tiutempe la edzino de Yuan, kiu preparis manĝon ĉiutage, ĝoje rigardis siajn familianojn, kun ventumilo en la mano: Ili ludis la rolon de juna intelektulo, bela princino, brava generalo aŭ aroganta imperiestro... "Mia avineto lertas en ludado, tamen sen bela voĉo," kun bedaŭro diris ŝia bonepino. La maljunulino suferis astmon tutajn jarojn kaj la voĉo raŭkiĝis. Ŝi estis analfabetino. Tamen ĉio ĉi ne malhelpis al ŝi interpreti la tekston de teatraĵo, ĉar ŝi bone notis ĝin en la memoro. Ŝi diris: "Escepte de rolo de virino, Yuan ludis ĉiun ajn rolon. En la juneo li ludis ekskluzive la rolon de princo kaj nun tiun de maljunulo. Ĉiuj miaj filinoj kaj bofilinoj ja lerte ludas la rolon de viro kaj tiun de generalo." Ŝia kvara filino sidis sur "trono" kaj estis genue salutata de sia subulo rolata de ŝia patro. Li plurfoje ludis la rolon de subulo de siaj gefiloj sur la scenejo.

Ĉiujare la 15-an de la deka monato laŭ la luna kalendaro okazas foiro. En ĝi kolektiĝas kamparanoj de diversaj lokoj. Ili prenas etmanĝaĵojn, ĝuas varieteon kaj spektas teatraĵojn. Granda spektaklo okazis antaŭ la scenejo de Dengwan-vilaĝo. Kontraŭ tio la teatro de Dingying-vilaĝo defie ludis saman teatraĵon senpage. Grandanima Yuan do lasis la rivalon komenci prezentadon duonhoron pli frue, tamen spektatoroj preferis prezentadon de la teatro de Dengwan-vilaĝo.

Bone prezentas ne nur plenkreskuloj, sed ankaŭ infanoj de la familio Yuan. Xingzi, sesjara pranepino de Yuan, ludis la rolon de filino en la populara tradicia teatro "Qin Xianglian" (Ĉin Ŝjangljan). Ŝi ekploris per pezaj larmoj, kiam aperis en la ludo la sceno, ke ŝia edzo perfidis ŝin kaj gefilojn, post kiam li sukcesis en imperiestra ekzameno kaj fariĝis grava ŝtatofunciano. Tiam la rigardantoj estis forte kortuŝitaj. Xingzi naskiĝis en aktora familio. La patro Yuan Guanghe kaj la patrino Wu Wenqin (U Ŭenĉin) geedziĝis dank' al teatroj. La patrino ludis teatron eĉ du tagojn antaŭ naskiĝo de sia filino. Kiam mi intervjuis la geedzojn, ĉi tiuj estis en malpaco. Wu Wenqin morte ploris, ke neniu povis ŝin trankviligi. Aŭdinte, ke komenciĝos tuj teatro-ludo, ŝi forviŝis la larmojn kaj komencis sin prepari por la ludo. Ŝi diris: "Nenio povas ĝeni mian ludon. Ludante teatron, mi forgesas ĉion ĉagrenan." Yuan Guanghe, rolulo de arlekeno, kaŝe diris al mi: "Mia edzino lertas en ludado. Kiam ŝi estas libera, ŝi preparas bongustan manĝaĵon por mi kaj faras pli da kamplaboroj por malpezigi al mi la ŝarĝon. Ĉi-foje kulpas ne ŝi..."

Yuan Guanghe vizitis la Imperiestran Palacon kaj Grandan Muron en Pekino. Laŭ li, Pekino distingiĝas sole per altaj domoj

kaj grandnombraj loĝantoj. Tamen ĝi ne povas kompari sin kun la pitoreska Dengwan-vilaĝo, fama pro ĉjuĝu-opero. Sed sola prezentado ne riĉigas. Por sin vivteni li negocis per ŝtofoj en dek jaroj, tamen li ĉiam inklinas al teatro. Ofte venis al li en la kapon la ideo: Se oni konstruus por ili grandan teatron! Se tiel, ili negocos tage kaj ludos teatron vespere. Jen granda gajeco por ili, ankaŭ por la vilaĝanoj...

Nun 3-jara Bao insistis ludi sur scenejo kune kun sia avo. Antaŭe aliaj vilaĝoj petis, ke la teatro de Dengwan-vilaĝo ludu teatron por ili en 10-15 tagoj. Ĉiufoje Yuan kunportis sian nepon. Kiam Yuan prezentis sur scenejo, Bao sidis post kuliso kaj atente aŭskultis la teatron. Foje Bao pretervole respondis al sia ludanta avo. "Wang Chao —". "Jes, mi!" "Marŝu!" "Laŭ via ordono!" La rigardantoj ekridegis kaj la avo kontentiĝis pri tio, dume la knabeto sentis hontemon. Lia bofratino diris: "Mia fraĉjo neniam mistonis!"

"Alportu akvomelonon!" Yuan ordonis en teatra voĉo. La filinoj kaj bofilinoj laŭvice aŭdigis la ordonon. La prezentado finiĝis kaj la aktoroj tutkorpe ŝvitis. Ĉe tio lia bonepino portis grandan akvomelonon el la ĉambro. Je ekstranĉo la akvomelono krevis...

Denove aŭdiĝis ridado en la korto de Yuan. ■

La familianoj prezentas antaŭ sia domo.



BATALO KONTRAŬ AKRIDO

Akrido estas ĉefa fiinsekto sur la paŝtejoj de Xinjiang (Ŝingĵang) en nordokcidenta Ĉinio, kiu ĉiujare katasfrotas ĉ. milionon da hektaroj. La akridoj manĝas herbojn kaj detruas la ekvilibron inter la brutaro kaj herboj. Delonge oni batalis kontraŭ akrido per insekticido. Sed konstanta aplikado de insekticido fortigis la reziston de akrido al la insekticido, multigis elspezon kaj samtempe mortigis multe da naturaj malamikoj de fiinsektoj. La ekologia ekvilibro de stepo estis rompita kaj la herbejoj estis poluitaj.

Komence de la 80-aj jaroj, en Xinjiang oni utiligis migrantan birdon — sturnon por ekstermi akridon. En la regionoj, kie troviĝas akridoj, oni starigis restadejojn por sturnoj. Rezulte de tio rapide multiĝis sturnoj en tiuj regionoj. En la jaro 1991 akridoj atakis 26.7 mil hektarojn da herbejoj en Shazi-distrikto de Tacheng. Oni allogis sturnojn por ekstermi akridojn, post 40 tagoj, la nombro de akridoj en ĉiu kvadrata metro da tero reduktiĝis de 40-80 al malpli ol 1. Laŭ nekompleta statistiko, en la pasintaj 10 jaroj, oni elspezis 600 mil juanojn por allogi sturnojn, kaj la elspezo por farado de nestoj estis nur 50 mil juanoj.

Sturno travintras en Hindio kaj Srilanko, ĝeneras kaj kreskas en printempo kaj somero en Xinjiang de Ĉinio, Okcidenta kaj Centra Azio. En la lasta tagdeko de majo, sturnoj grupe venis al Xinjiang, ĝuste kiam elkoviĝas akridoj. Laŭ observo, sturno formanĝas 120-180 akridojn ĉiutage. De la jaro 1981 oni povas allogi 500 mil sturnojn ĉiujare kaj miliono da hektaroj da herbejoj en Xinjiang estis protektataj kontraŭ akridoj.

PONTO EL SALO

Sur la ŝoseo de la urbo Golmud de Qinghai (Ĉinghaj)-provinco al la urbo Dunhuang de Gansu-provinco, estas fama ponto farita el salo, 32 kilometrojn longa.

En Ĉajdam-baseno, de okcidento al oriento, dislokiĝas dekoj da salaj lagoj. Norde de Golmud estas sala Ĉarhan-lago kun areo de 5 856 kvadrataj kilometroj, sur kies surfaco estas sala krusto dika je kelkdek centimetroj. La sala krusto estas tre firma, ke ĝi povas subteni domegon kaj trajnon. Tamen malfacilas konstrui vojon sur ĝi pro diversaj kavoj grandaj kaj etaj, vide-

blaj kaj kaŝitaj, tre danĝeraj por veturado. Novembre de 1954 grupo da vojlaboristoj eniris en Ĉarhan. Granda kavobaris ilian vojon. La laboristoj malfermis la salan kruston kaj per ĝi ŝtopis la kavon. Per sama rimedo ili plenigis milojn da kavoj, kaj la vojo longiĝis metro post metro. La 22-an de decembro, kamiono ekiris de norda bordo de Ĉarhan tra la sala ponto kaj atingis Golmud.

Probable oni povas rigardi tion miraklo en voj-konstruado, ĉar fakuloj asertis, ke ne eblas konstrui vojon tie, kie la grundo enhavas salon je pli ol 8%. Sed la sala ponto estis farita sur la sala lago, kiu enhavas salon je 20-95%.

Nun ĉiutage la salan ponton traveturas 1 000 aŭtoj, kies rapideco atingas 80 km. hore. La sala ponto ludas gravan rolon en ekonomio de Qinghai kaj Tibeto.

MEZURUNUO DE LONGO EN ANTIK-VECO

Nun oni mezuras longon per norma mezurilo. Sed antikve la normo estis parto de homa korpo — antikva mezurunuo de longo devenis de homa korpo.

En antikva Ĉinio, oni mezuris longon per parto de sia korpo. Laŭ legendo Yu, estro de alianco de triboj, difinis, ke la longo de lia staturo estu *ĝang*, kaj dekonono de *ĝang* estu *ĉi*, do *ĝang* kaj *ĉi* estis mezurunuoj de longo en la antikva Ĉinio. Antikvuloj difinis ankaŭ, ke la distanco inter la ekstretoj de la dik- kaj montr-fingroj estu *ĉi*, la larĝo de dikfingro estu *cun*. Nun en akupunkturo kaj mokso de la ĉina medicino oni ankoraŭ sekvas tiun mezursistemon.

Tian metodon aplikis ankaŭ aliaj landoj. Charlemagne la Unua de la Romana Imperio difinis, ke longo de lia piedo estu "nova roma futo". En la antikva Egiptujo oni prenis distancon inter la kubuto kaj la pinto de la meza fingro de Faraono kiel mezurunuon de longo, kaj nomis ĝin "pojna futo". Historia libro notis, ke oni konstruis piramidojn aplikante la "pojnjan futon" de la Faraono Khufu kiel mezurunuon. En la angla lingvo, futo kaj piedo estas sama vorto — foot.

Sciencoj progresas, kaj la menciitaj mezurunuoj ne plu validas. Nun tra la tuta mondo oni observas la internacian sistemon de mezurunuoj, en kiu la baza unuo de longo estas "metro".



Usona esperantistino Lucille Harmon (maldekstre) kaj nepalaj esperantistinoj

Esperantistinoj preparantaj Esperantan ekspozicion



Esperantistinoj kaj afrikaj partoprenantoj



Esperantistinoj en NRO-Forumo

Teksto de SUN AIJUN

Fotoj de LIU SIGONG

ESTAS malofte ke Esperanto okupis angulon, kvankam malvastan, en tre impona internacia kunveno, kia la '95 Forumo de Neregistaraj Organizo (NRO-Forumo), kiu okazis de la 30-a de aŭgusto ĝis la 8-a de septembro 1995 en Huairou-gubernio de Pekino.

La forumo estas signifoplena ejo de virinoj de la mondo por renkonti kaj diskuti pri diversaj problemoj virinaj kaj sociaj el perspektivo de la tuta virinaro de la mondo.

Esperantistinoj en la NRO-Forumo

Ĉeestante la forumon, dekkelkaj japanaj e-istinoj kunlaboris por Esperanto kaj per Esperanto. En la malgranda Esperanta rondo troviĝis ankaŭ s-ino Lucille Harmon de Usono, kiu aliĝis al la rondo precipe por esti interpretanto kaj volontulo, kaj mi, raportistino de "El Popola Ĉinio". Estas granda honoro kaj ĝojo por mi pasigi tri tagojn kune kun miaj aktivaj samideaninoj.

ESPERANTA VIRINA AGADO PEKINO '95

En la kunveno de la forumo

troviĝis panelo, sur kiu estis metitaj okulfrapa verda stelo de Esperanto, Esperantaj eldonaĵoj, gazetoj kaj leteroj kaj fotoj pri E-movado.

La ekspozicio estis aranĝita de la grupo Esperanta Virina Agado Pekino '95, kiun konsistigis 9 e-istinoj de Japanio. Kelkajn monatojn antaŭ la forumo ili ekpreparis la ekspozicion kaj enketadon. Miloj da broŝuroj kaj enketiloj pri Esperanto en 12 lingvoj ne malmulte elspezigis ilin. Ili ankaŭ petis helpon de e-istaj amikoj de la mondo por materialoj de la ekspozicio. S-ino Ai-





Japanaj esperantistinoj propagandas Esperanton.

hara Misako, gvidanto de la grupo, opiniis, ke ĉio tio indas por montri al la mondo la ekziston kaj utilecon de Esperanto.

De la 31-a de aŭgusto ĝis la 2-a de septembro en la forumejo oni ofte vidis japanajn samideaninojn en veŝto kun surskribaĵo "Esperanto '95 Pekino". Ili disdonadis la broŝurojn kaj enketilojn al la partoprenantoj por kolekti iliajn opiniojn pri lingva problemoj.

Al la forumo aliĝis pli ol dek miloj da homoj el diversaj anguloj de la mondo, kun celo interŝanĝi opiniojn pri virinaj problemoj. Sed bedaŭrinde la lingvoproblemo embarasis ilin.

Kvankam parolantoj de la angla lingvo preskaŭ ne havis malfacilon por interkomunikiĝi kun aliaj pro tio, ke plejparto de la kunvenoj uzis kaj plejparto de la partoprenantoj scipovis la anglan lingvon, tamen la lingva problemoj efektive ekzistis. Multaj virinoj ne posedis sufiĉe la komune uzatan lingvon por ĝui interesan konversacion aŭ libere esprimi sian senton. Rezulto de la enketado montris, ke oni deziras komunan lingvon, facile uzeblan

por internaciaj kontaktoj.

Post la enketado japanaj e-istinoj kunsidis kun kelkaj alilandaj partoprenantoj. Ili opiniis, ke oni devas direkti atenton al la problemoj de lingva diskriminacio kaj trovi pli bonan manieron por faciligi veran internacian komunikadon por la 21-a jarcento. S-ino Aihara Misako verkis artikolon kaj ĝi estis publikigita en la angla lingvo kaj Esperanto en la ĵurnalo *Forumo*, la 4-an de septembro.

MALGRANDA KONFERENC CO PER KOMUNA LINGVO

Frumatene de la 1-a de septembro, en tendo 19-T11 okazis malgranda konferenco kun temo "Fariĝu Nova Virino" organizita de grupo Ĉaro el 9 lernantaj virinoj de Tokio. S-ino Sonoko Kuzume, s-ino Lucille Harmon kaj mi interpretis la prelegon en Esperanton, en la anglan kaj ĉinan lingvojn respektive.

Prezidanto s-ino Yokoi Kiyoko ekparolis: "Nun ni vivas en la socio, en kiu ankoraŭ multaj nekonsenteblaj aferoj malhelpas virinojn. Ni devas lerni el la spertaĵoj de antaŭ-

uloj, retrorigardi nin kaj fari novan paŝon." Ŝi daŭrigis, ke antaŭ 80 jaroj sub la tradicio de vira superregado kaj patriarko, virinoj en Japanio havis humilan vivon. Edzino estis rigardata kiel "laborulo" kaj "ilo" por naski idojn. Homaj rajtoj ne estis konsciataj de virinoj pro malalteco de la eduka nivelo. Antaŭ nelonge oni ankoraŭ diris, ke "estas pli feliĉe por virinoj ne lerni, ĉar lernado malkovras kontraŭdiron en la socio".

Malgraŭ pluvo kelkaj nepalaj virinoj sukcesis trovi por si la lokon. Ili atenteme aŭskultis la prelegon kaj poste unu el ili rakontis malfeliĉan vivon de 89-jara maljunulino en sia hejmloko: Ŝi edziniĝis 5-jara kaj gravediĝis kiam ŝi estis nur 9-jara. Nun ŝi havas 14 gefilojn kaj vivas tre malfacile. La maljunulino volas sciigi pere de sia amikino al la mondo sian mizeran vivon kaj esperas, ke tia tragedio ne okazos plu.

S-ino Harmon opiniis, ke estis rimarkinda kaj gratulinda afero la diskonigo de Esperanto en la NRO-Forumo. Esperanto akiris grandan sukceson ĉi tie. Ankaŭ mi fieris, ke mi estis membro de Esperantujo.

SPECIALA TAGORDO POR ESPERANTISTO-PARTOPRENANTOJ

Krom siaj laboroj por kaj per Esperanto, e-isto-partoprenantoj ĉeestis ankaŭ aliajn kunvenojn pri diversaj problemoj virinaj kaj sociaj.

Ili lernis afrikan spiritan dancon por ordigi la funkcion de la korpo, rigardis internacian teatraĵon "La mondo en la okuloj de virinoj", ĉeestis la diskuton pri Forteco de Lingvo, aŭskultis prelegojn pri kulturo kaj interkomunikiĝo kaj pri strategio por unuglobiĝo de ekonomio, ĝuis afrikajn kantojn kaj dancojn...

Posttagmeze de la 1-a de sept., laŭ la invito kvin japanaj e-istinoj kaj s-ino Harmon veturis al la redakcio de EPC por kunsidi kun ĝiaj

laborantoj.

Enirinte en la akceptan ĉambron de la redakcio la gastoj tuj sentis familiarecon. Informiĝinte ke pro hasteco al la redakcio kelkaj gastoj ankoraŭ ne tagmanĝis, miaj kolegoj tuj aĉetis panojn por kvietigi grumblon de ilia stomako. La manĝaĵo estis tre simpla, sed la koro varma.

Ĉiuj gastoj esperantistiĝis antaŭ pli ol 20 jaroj. Iuj el ili partoprenis en la 71-a UK en Pekino en 1986 kaj en la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto en Qingdao en 1992. Sed estis la unua fojo por ili gastis en la redakcio de EPC.

S-ino Takeuti Tomiko estas malnova abonanto de EPC. Ŝi ĝojegis, ke ŝi revidis s-inon Tan Xiuzhu kaj s-ron Dai Song'en, kun kiuj ŝi renkontiĝis julie en Tampere, Finnlando.

Ankaŭ ges-roj Harmon estas

malnovaj amikoj de EPC. Ili kelkfoje vizitis Ĉinion pro Esperanto. S-ino Harmon kunportis al la redakcio salutojn de sia edzo.

La gastoj vizitis ĉiujn fakojn de la oficejo de EPC kaj aĉetis Esperantajn librojn ĉe la libroservo. Duhora kunsido estis tute nesufiĉa por ĉiuj eldiri ĉion deziritan. Por memorigo ni kune fotiĝis antaŭ la domo, en kiu sidas EPC.

Iuj diris al mi, ke Esperanto estas strangaĵo de la socio kaj finfine estos forgesita de la homaro. Foje mi jam perdis esperon pri ĝi. Sed per siaj agado kaj sukceso miaj samideaninoj pruvis, ke Esperanto ludas gravan rolon en internacia interkomunikiĝo. Ni nepre devas sindoneme disvastigi ĝin per ĉia maniero, je ĉia ŝanco. Mi jam revenis al la fido, ke neniam ĉesos la disvastiĝo de nia lingvo dank' al la klopodo de niaj estimataj samideaninoj. ■

Starigo de Esperanta propagandilo



Esperantistinoj-partoprenantoj en la redakcio de EPC



EKONOMIO

● Inventaro de la ĉina aktivo montris, ke kvankam la 1 000 grandaj ŝtataj entreprenoj viciĝintaj laŭ la totala aktivo konsistigas malpli ol 0.5% de la totala nombro de la ŝtataj entreprenoj de Ĉinio, tamen ilia totala aktivo konsistigas 40% de tiu de ĉiuj ĉinaj ŝtataj entreprenoj, ilia imposto pagita al la ŝtato — 52% de tiu de ĉiuj ŝtataj entreprenoj. Tio atestas, ke la grandaj ŝtataj entreprenoj kun absoluta supereco ludas ĉefan rolon en la ĉina nacia ekonomio.

● En la 1-a de aŭgusto 1995 la aerodromo Jiangbei (Ĝjangbej) en la urbo Chongqing (Ĉongĉing), Sichuan-provinco, estis oficiale lanĉita al eksterlando. Nun 28 el la 132 ĉinaj aerodromoj malfermiĝis al alilandaj aviadaj kompanioj. La 28 aerodromoj estas instalitaj per avangardaj telekomunikaj kaj pilotaj ekipaĵoj kaj aera trafikregara aranĝaĵo kaj proponas fervoran teran servon.

● La totala generatora kapacito de Ĉinio estis 100 milionoj da kilovattoj en 1987 kaj superis 200 milionojn da kilovattoj en la fino de julio 1995. Nun en Ĉinio ankoraŭ mankas elektro al 93 milionoj da homoj kaj en 17 gubernioj neniam lumis elektro.

● Ĉinio investis 4 739 entreprenojn eksterlande kun totala sumo de 5.327 miliardoj da usonaj dolaroj.

● La gubernio Wuxi (Uŝji) de Jiangsu (Ĝjangsu)-provinco estis ŝanĝita en urbon Xishan (Ŝjiŝan) lastatempe. Ĝia registaro sidas en la antaŭa distrikto Dongting. Laŭ la skalo de 200 000 urbaj loĝantoj kaj jara industria produktovaloro de 20 miliardoj da juanoj, antaŭ tri jaroj oni konstruis tie novan urbon kun areo de 10 kvadra-

Novaj konstruaĵoj en Xishan



taj km. En ĝi konstruiĝis cementa ŝoseo, 98 km longa, kaj 200 modernaj domegoj.

SCIENCO KAJ TEKNIKO

● De 1987 Ĉinio metis en satelitojn semojn de verda fabo, pizo, kukumo, tomato, sojfabo, hordeo, tritiko, rizo, ginsengo, kotonoj kaj aliaj 20 plantoj por ekzameni mutacian influon de mikrogravito kaj kosma radiado sur ilin, kiam la satelitoj iris en la spaco. La ripetada eksperimento montris, ke ĉe iuj semoj okazis fiziologia variado, kiun ne povas konservi iliaj idoj, kaj ĉe la aliaj okazis heredeca variado, kiun povas konservi iliaj idoj. Sekaj semoj de kukumoj transportitaj en la spacon ĝermis, maturiĝis pli frue ol surtere kaj estas pli fortaj kontraŭ malsanoj.

● La unua altfidela septolora presaĵo de Ĉinio naskiĝis en Pekino antaŭ nelonge. La presaĵo farita per nova teknologio estas identa kun la originala foto.

● La unua altfunkcia intelekta roboto "Jingmi n-ro 1" naskiĝis en Ŝanhajo. Ĝi kun flekseblaj "korpo" kaj "brakoj" havas du "cerbojn" kaj povas libere labori en la difinita vidkampo.

● La Instituto pri Animala Reprodukado sub la Guangxi (Güangŝji)-a Universitato kaj la Instituto pri Laseraj Vivsciencoj sub la Sudĉinia Instruista Universitato kunlaboris pli ol du jarojn kaj sukcesis en nuklea transplantado. Bovido 22.5 kg peza naskiĝis per eksterkorpa nuklea transplantado. Tio estas la unua ekzemplo en Ĉinio.



Fosilia dinosaŭra ovo

● Ĉinaj sciencistoj trovis dinosaŭran feton en iu dinosaŭra fosilia ovo, elterigita en la gubernio Xixia (Ŝjiŝja), Henan-provinco.

El la 43 kolorfotaj de dinosaŭra fosilia ovo,

traktitaj per komputera tomografio, klare videblas ombro de konturo de malgranda dinosaŭra skeleto. Oni diris, ke tio estas malofta en la mondo kaj havas gravan sciencan valoron por pluapase solvi enigmon de dinosaŭro.

KULTURO

- La delikata ligna kompasoj farita de la ur-beto Wan'an, Xiuning(Ŝiuning)-gubernio, Anhui-provinco, famas en- kaj eksterlande dum centoj da jaroj kaj gajnis oran medalon en la Universala Foiro de Panamo de 1915.

La kompasoj de Wan'an prezentas riĉan tradician kulturon sur sia malgranda karto. Ĝi povas montri direkton, kalkuli la eraojn, 24 sunperiodojn kaj 64 antikvajn trigramojn. Antikvuloj uzis la kompasojn por determini direkton, kiam ili mezuris ebenon, fiŝkaptis sur maro aŭ veturis sur oceano. En la lastaj jaroj metiistoj prenis raran lignon kiel materialon kaj el ĝi faris delikatajn kompasojn en malsamaj diametroj de 10-60 cm. La kompasoj, delikate grifelitaj kaj desegnitaj per peniko el putortaj haroj estas valoraj artaĵoj.

- Antikva ermita ĉino Guiguzi kaj libro titolita per la sama nomo estis prenita kiel malaŭtentikaj. En kolokvo pri Guiguzi okazigita en Qixian(Ĉjiŝjan)-gubernio, Henan-provinco, s-ro Li Xueqin (Li Ŝjueĉin), estro de la Historia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj, kaj liaj

Kaligrafajo de
Zhang
Hongchun




kolegoj, surbaze de granda kvanto da libroj el bambuaj slipoj kaj silkaĵoj konstatis, ke en la historio vere ekzistis Guiguzi kaj lia libro. Guiguzi fondis proviant-administracion de la Militantaj Regnoj (475-221 a.K.), la plej antikvan militan lernejon de Ĉinio, en Yunmeng-monto de Qixian-gubernio kaj prenis la libron "Guiguzi" kiel la

ĉefan lernigilon. La libro estas unu el la gravaj esploraĵoj temoj en la ĉina akademia historio. Ĉiujare multaj turistoj ĉinaj kaj eksterlandaj vojaĝis al la ermitejo de Guiguzi en Qixian-gubernio.

- Juna f-ino Zhang Hongchun (Ĝang Hongĉun) devenis de Yan'an sur la Leŭsa Altebenaĵo. En sia unuafoja vojaĝo al Pekino ŝi eniris en la Ĉinan Belartan Domon, artan palacon de Ĉinio, por aranĝi sian propran ekspozicion de kaligrafiaĵoj. Ŝi atingis sukcesojn en kaligrafio dank' al instruado far sia patro kaj al sia diligenteco. Ŝi lernis kaligrafion 20 jarojn, kopiis kaligrafiaĵojn de multaj famaj kaligrafoj kaj fine formis sian antikvecan, naturan, bravan kaj liberan kaligrafian stilon.

TURISMO

- En 1994 la Ĉina Internacia Turisma Servo gajnis profiton de 7 miliardoj da usonaj dolaroj kaj per tio okupis la dekan lokon en la mondo post Usono, Francio, Italio, Hispanio, Britio, Aŭstrio, Germanio, Hongkong kaj Svisio.



La pando Dudu

- La Ĝardenistika Projekta Instituto de Ŝanhajo "transportis" 15 ĉinajn klasikajn ĝardenojn en Germanion, Svedion, Nederlandon k. a. "Menghu-ĝardeno" en la Montrealo de Kanado prezentas la naturan medion akcentitan de la ĉina ĝardenistiko. Tie oni plantis ankaŭ lokajn arbidojn zorgeme elektitajn kaj la ĉinajn bambuojn kaj osmantojn. Konsiderante, ke la abunda neĝo de la loko multe ŝarĝas la tegmenton, oni konstruis specialan tegmenton per avangarda teknologio kaj tiel solvigis la kontraŭfrosta problemo de la ĉina klasika arkitekturo.

- Pando Dudu en la zoo de Wuhan, Hubei-provinco, jam havas 33 jarojn. Antaŭ dek jaroj ĝi blindiĝis de katarakto, ĝiaj dentoj defalis kaj ĝi ne povis manĝi bambuŝoson. Bredisto nutris ĝin per likvaĵo de kuirita rizo, lakto, vitaminoj kaj mikroelementoj, tial ĝi fariĝis la plej aĝa el la arte breditaj pandoj en Ĉinio.

ZHENG ZHENJIE:

Montanoj penas por nova celo

SE oni mencias Linxian(Linŝjan)-gubernion, la homoj de pli ol 35 jaroj nature ligas la nomon kun la kanalo "Ruĝa Flago", honorita kiel "miraklo de la homa mondo". Kiujn utilojn la kanalo alportis al la popolo de la gubernio, kaj kion entreprenas la homoj, kiuj konstruis la kanalon antaŭ pli ol 30 jaroj?

POSTULI AKVON DE ZHANGHE-RIVERO

Linxian-gubernio situas profunde en Taihang-montaro etendiĝanta sur la limregionoj de la provincoj Henan, Hebei kaj Shanxi (Ŝanŝji). Tie la montoj estas altaj, valoj profundaj, tertavolo maldika kaj roktavolo dika. Dum multaj generacioj la montanoj suferadis de manko de akvo. En la 60-aj jaroj en la gubernio estis 500 relative grandaj vilaĝoj, kaj 300

el ili ne havis akvofonton. Bedaŭrinde, pli ol 100 vilaĝoj distancis de akvofonto je minimume 10 km. Triono de la laboruloj faris nenion krom porti akvon. Ĉu la gubernio vere ne havis akvofonton? Fakte, norde de la gubernio fluas nermalgranda rivero Zhanghe, sed la loĝantoj ne havis la forton konstrui kanalon por alkonduki akvon.


En 1960 komenciĝis konstruado de kanalo por fluigi akvon de Zhanghe-rivero en la gubernion. Oni donis al la kanalo belan nomon "Ruĝa Flago". En 1960 Ĉinio estis atakata de natura katastrofo kaj ne povis asigni necesan monon al la konstruado de la kanalo. Sed la popolo longe suferanta de manko de akvo jam ne povis atendi plu. Sen maŝino, la montanoj laboris per manoj. Ili forhakis 1 250 grandajn kaj malgrandajn montpintojn kaj sukcesis konstrui la kanalon kun totala longo de 1 500 km, kaj ĝia trunka parto en longo de 70 km kaj larĝo de 8 metroj pendas 4.3 metrojn super la tero. De tiam la akvo de Zhanghe-rivero fluas en Linxian-gubernion kaj irigacias 33 000 hektarojn da kampoj, kio solvis la problemon de akvomanko por 300 000 homoj.

ELTURNIĜO EL MALRIĈECO

Oni devas konfesi, ke la kanalo solvis la problemon de irigacio de du trionoj de la kampoj de la gubernio kaj trinkakvo por homoj kaj brutoj, kaj multe ŝanĝiĝis la klimato kaj ekologia medio. Sed ĝi ne radikale ŝanĝis la malriĉecon de la gubernio. Tion kaŭzis ĉefe ekskluziva kulturado de greno. Tiam la gubernio ne havis fabrikon, kaj ĝia financo estis malfacila, kompreneble la vivo de la kamparanoj estis malriĉa. Fine de la 80-aj jaroj la hektara produktokvanto de greno estis 7 500 kg kaj 80% de la kalvaj montoj verdigitaj, sed la vivo de la kamparanoj restis nekontentiga.

Kiel plibonigi la vivon de la kamparanoj? La popolo analizis sian situacion kaj vidis malavantaĝon kaj superecon. La malavantaĝo estis, ke ĉiu 15-a kamparano ne povis havi unu hektaron da kampo. La supereco estis, ke en la konstruado de la kanalo naskiĝis armeo da konstruistoj. Do la konstruistoj forlasis la montaron por elhaki novan vojon por plibonigi sian vivon.

Foje oni urĝe bezonis meti en Taiyuan, ĉefurbo de la najbara provinco Shanxi, subteran kablon en longo de 400 metroj. Sed oni postulis, ke la konstruado estu farata nokte, ĉar tage la trafiko ne povis lami. La kablo estis transironta tri stratojn, kaj subtere estis araneaĵo da tuboj por akvolivero, elektro kaj telekomuniko. Krome la laboro devis esti plenumita post 20 tagoj. Pro mallongeco de permesita tempo, peza tasko kaj frosta vetero, multaj grandaj entreprenoj de la loko malakceptis la laboron per diversaj motivoj. Sed s-ro Guo Shunxing (Gŭo Ŝunŝing), estro de la konstrua taĉmento de Linxian, mem iris al la komisianto kaj akceptis la laboron. 300 konstruistoj el Linxian formovis frostan tertavo-



La kanalo "Ruĝa Flago"

lon en dikeco de 70 cm kaj bone finis la laboron post 12 tagoj. La magistrato de Taiyuan donis senprecedencan permeson, ke la konstrua taĉmento de Linxian povos adjudiki ĉiajn laborojn en Taiyuan.

Grupoj kaj grupoj da konstruistoj eliris el la montaro. En 1985 la gubernio havis 80 000 konstruistojn kaj en 1993 jam 130 000. Dank' al sia diligenteco la konstruistoj akiris laboron en 250 urboj de Ĉinio kaj ankaŭ en Pakistano, Kuvajtio, Jemeno, Filipinoj kaj Rusio. Tie ili perlaboris ĉiujare 400 milionojn da juanoj. Nun la popolo de Linxian-gubernio havas relative bonan vivon.

NOVAJ SUKCESOJ

Antaŭ kelke da jaroj Linxian fariĝis urbo kaj alinomiĝis Linzhou (Linĝou). La penemo kaj diligenteco de la popolo, montritaj en la konstruado de la kanalo "Ruĝa Flago", daŭre edifas la homojn.

Junie de 1993 naskiĝis en Linzhou la unua entrepreno investita de Ĉinio kaj alia lando, la Dafang-a Ceramika Kompanio Limigita en Anyang. Dum ĝia konstruado okazis tre interesa afero. Al Linzhou venis specialista grupo el Italio por direkti muntadon de la ekipaĵoj. Kiam la specialistoj rimarkis, ke du pregmaŝinoj en alto de 6 metroj kaj pezo de 50 tunoj ankoraŭ ne estas sur sia loko, ili petis la kompanion pretigi 70-tunan levmaŝinon. Tiam ne nur en Linzhou, sed eĉ en la regiono Anyang, al kiu Linzhou apartenas, oni ne povis trovi tiel grandan levmaŝinon. Kiam direktoro Hou Yonghe diris al siaj fremdlandaj partneroj, ke liaj laboristoj povos tiri la ekipaĵojn sur la lokon, iu el la italaj specialistoj diris: "Ĉi tie ne estas la kondiĉoj por munti la maŝinojn, do ni reiru al Italio kaj revenos post duonjaro." Post la diro li tuj iris al la hotelo. S-ro Hou postkuris kaj promesis al li: "Bonvolu atendi 3 tagojn. Se post 3 tagoj mi ankoraŭ ne povos loki la pregmaŝinojn, mi eskortos vin al la flughaveno."

La itala specialisto ekridis: "S-ro Hou, eĉ 10 tagoj ne sufiĉos por vi."

20 laboristoj organiziĝis por urĝa lokado. Ili prunteprenis de najbara fabriko 6 krikojn de granda povo, 4 ĉentakelojn kun levpovo de 20 tunoj kaj 200 relojn. Per tiuj simplaj iloj ili movis la maŝinojn colo

post colo. Post 38 horoj ili sukcesis loki la du maŝinojn.

En la hotelo interpretisto dufoje rakontis tion al la itala specialisto, sed li ne kredis. Kiam li venis al la loko kaj vidis la fakton, li admiris: "Mirinde! Brava estas la popolo de Linzhou!" Li tuj informis sian direktoron, kaj rezulte Linzhou akiris investon por la 2-a kaj 3-a produktolinioj.

Nun en Linzhou estas pli ol 20 000 entreprenoj funkciigataj de kamparanoj, inkluzive de pli ol 100 por-eksportaj entreprenoj. En tiuj entreprenoj laboras pli ol 250 000 homoj. Tiuj entreprenoj okupiĝas pri konstruado, farado de konstruaj materialoj, paperfarado, min-ekspluatado, kemiindustrio, maŝinfabrikado kaj manĝaĵo-prilaborado. Pli ol 2 000 specoj da iliaj produktaĵoj vendiĝas en la lando kaj pli ol 60 specoj eniris en la internacian merkaton. Laŭ la plano la totala produktovalor de la entreprenoj de Linzhou atingos 10 miliardojn da juanoj en la fino de 1995.



KROM LA KANALO "RUĜA FLAGO"...

Kiel arĝenta rubando, la 1 500-kilometra kanalo jen fluas zigzage ĉirkaŭ montotalioj, jen trairas tunelojn. La montoj flanke de la kanalo estas ombraj de arboj. Tie kaj tie oni povas vidi steleojn, surrokajn gravuraĵojn, akvokonservejojn grandajn kaj malgrandajn, alte pendantajn viaduktojn. La pejzaĝoj altiras al si multajn turistojn, kaj la popolo de Linzhou kaptis la ŝancon por disvolvi turismon.

La distrikto Shibanyan en absoluta alteco de 1 000 metroj estis la plej izolita kaj plej malriĉa en la gubernio. Ĝiaj 2 700 kamparanaj familioj dislokiĝas en areo de 114 kvadrataj kilometroj. Nun la loko jam havas ŝoseon de pli ol 40 kilometroj, programregatan telefonion kaj aliajn modernajn telekomunikilojn. La kondiĉoj de la loko allogis pli ol 20 investantojn. Antaŭ du jaroj tie okazis la unua azia konkurso de aervelado de pokalo "Suna-Luna Dio", en kiu partoprenis sportistoj el 7 landoj kaj regionoj de Azio. La ĉielo estis punktita de veloj ruĝaj, bluj, oranĝaj kaj purpuraj.

Antaŭe la popolo de Linzhou ĝuis renomon per la kanalo, kaj nun ili daŭre strebas por havigi al si pli bonan vivon. ■

En laborejo de vilaĝa fabriko de trinkaĵo el frukta suko



La Industria kaj Komerca Kompanio de Granito de Linzhou

Direktoro el kamparano



POST kelkfoja vizitado eksterlande, s-ro Gong Xuebin (Gong Ŝjuebin) ekhavis novan esportemon por si: rezonadi pri la “internaciaj avantaĝoj” de legomkulturado.

S-ro Gong ne estas specialisto nek profesoro, li estis brikofaristo. Sed nun li estas prezidanto kaj ĝenerala direktoro de la grupo-kompanio Longda de Yantai, kies okupo estas kulturo, prilaboro kaj vendo de legomoj. Kaj li ŝatas nomi sin legomvendisto.

Kiel interrilatiĝis legomvendado kaj la “internaciaj avantaĝoj”?


S-ro Gong diris, ke al lia loko ne mankas laboruloj kaj tero, kie povas kreski rafano kaj brasiko, kaj plie, la prezo difinita de li estas alloga. Jen liaj “internaciaj avantaĝoj”. Li decidis disvolvi siajn avantaĝojn en la internacia merkato.

Jam ĉe sia unua paŝo s-ro Gong prenis fremdajn landojn kiel siajn estontajn klientojn. En sia ĝardeno li kulturis dekojn da specoj da legomoj, ekzemple taro, karoto, pizo, kapsiko kaj asparago. Krome li enkondukis el Japanio novajn specojn, ekzemple lapo, senvirusa frago kaj nederlanda guŝofazeolo. En liaj plastmembranaj forcejoj kreskas legomoj el diversaj landoj, kaj oni nomas ilin “internacia legomĝardeno”.

Ankaŭ lia prilaborado de legomoj havas grandan skalon. Sin apogante sur siaj legomaj forcejoj kaj la legomĝardenoj de la kamparanoj en la ĉirkaŭaj spacoj de cent kilometroj, li konstruis hermetikajn prilaborejojn kaj fridtenejon. Lia entreprenado produktas bonkvalitajn fridigitajn tarojn, legomajn rulaĵojn kaj ajlajn ĝermojn. Nun ĝi jam havas 8 fabrikojn, kiujn ĝi investis kune kun Japanio, Koreio, Singapuro kaj Hongkong respektive, entute kun miloj da laboristoj. La fridigitaj legomoj de la entreprenado vendiĝas en 80% de la memservejoj de Japanio.

Antaŭ kelke da jaroj, kiam s-ro Gong komencis prilabori fridigitajn legomojn por Japanio, la unua

En prilaborejo de legomoj



mendo estis porea dishakitaĵo. Foje la japana mendinto rimarkis en la legomo malpuraĵoj kaj postulis de s-ro Gong kompenson de 400 mil juanoj. Informiĝinte pri tio, s-ro Gong tuj plibonigis la ekipaĵojn de la laborejoj kaj estis pli rigora al la laboristoj je vestado kaj intensigis kontrolon de kvalito en la prilaborado. Poste la japana mendinto vizitis la fabrikan, rimarkis la plibonigon de la kondiĉoj en la laborejoj, sentis lian sincerecon kaj retiris la postulon de kompenso.

S-ro Gong ĉiam tenas rigoran normon por la kvalito de la produktaĵoj. Li ofte rimarkis mankon, kiun la aliaj ne povis rimarki. Ekzemple, povas fali la rusto de la ŝraŭboj sur la plafono de la sterila laborejo, povas defali lako de marko sur lavpelvo de legomoj, mankas kontraŭeksplozaj ŝirmiloj por inkandeskaj lampoj sur la plafono...

S-ro Gong estas akurata en plenumo de kontrakto. En 1992, kiam Longda kaj japana entreprenisto kune investis, s-ro Gong donis grandan kapitalon por fondi bazon de lapo. Sed tiujare la aĉeta prezo de unu kg. da lapo leviĝis de 1.2 al 3.6 juanoj. Se la entreprenado daŭre aĉetos kaj prilaboros lapon por eksporto, ĝi multe malprofitos. Se la entreprenado ĉesos tion fari, ĝi rompos la promeson. S-ro Gong senhezite persistis en aĉetado kaj prilaborado de lapo por eksporto, ĉar li bone komprenis, ke konfido estas pli valora ol oro. En tiu jaro la entreprenado malprofitis je 700 mil juanoj pro eksporto de lapo. Sed la faro donis al la entreprenado bonan reputacion, ke la nombro de ĝiaj kunlaborantoj multiĝis de 2 al 6.

En 1992 s-ro Gong kaj la ĉirkaŭaj kamparanoj organiziĝis en korporacion de manĝaĵo-faristoj. Ĝia celo estas determini la minimuman kaj maksimuman prezojn de aĉeto kaj eksporto de legomoj, defendi la interesojn de la kamparanoj kaj iliaj fabrikoj.

Nelonge post la fondiĝo de la korporacio okazis akuzo kontraŭ s-ro Gong: Iu fremdlanda fikomercisto devigis la membrojn de la korporacio malaltigi la prezon de siaj eksportaĵoj, montrante falsan kontrakton kun falsita subskribo de s-ro Gong. Sed lia friponaĵo estis malkaŝita de la korporacio. Tio elokvente pruvis la rolon de la korporacio kaj eĉ fremdlandaj komercistoj ŝatas konsulti la korporacion pri la kurzo.

Sed s-ro Gong ne estas memkontenta pri la korporacio. Li intencas starigi novan sistemon de kunlaboro kun aliaj landoj por trovi disvolviĝon de internacia kunlaboro pri agrikulturaj produktaĵoj. Por tio s-ro Gong faras provon per la akra vido kaj kuraĝo de entreprenisto. ■

CHEN XIAOWEI:

Blinduloj adiaŭu mallumon



Laborantino de la Brajla Biblioteko reordigas brajlajn librojn, antaŭ ol sendi ilin al legantoj.

INTER multaj ĉinaj biblioteko-koj, la Brajla Biblioteko estas aparta — en ĝi ne estas multe da libroj, eĉ ne estas legoĉambro nek libropruntejo. La blinduloj en diversaj lokoj de Ĉinio povas prunti librojn, se ili letere sciigas la bibliotekon pri titolo de la bezonata libro. La blinduloj sentas, ke la biblioteko portas feliĉon kaj lumon al ili.

La Brajla Biblioteko en Pekino estas fondita de la unika ĉina Brajla Eldonejo. Meze de la 50-aj jaroj, la Brajla Eldonejo eldonis “Monatan gazeton por blinduloj”, kiu estis la unua en Ĉinio. Vidinte la gazeton, prezidanto Mao Zedong ĝoje fermis siajn okulojn, palpis la elstarajn punktojn kaj diris: “Estas por mi la unua fojo legi brajlon, mi tute ne komprenas.” La brajlo per 6 elstaraj punktoj esprimas tiel multe da vortoj, ke tiu elstara gvidanto estis surprizita. Post kelkaj jaroj, la Brajla Eldonejo eldonis la unuan brajlan libron — romano “Kiu estas plej aminda?” Informiginte pri tio, prezidanto Mao diris al la laborantoj de la eldonejo: “Blinduloj estas malfeliĉaj, via laboro donas al ili lumon.”

Pasis 40 jaroj, la Brajla Eldonejo ŝanĝiĝis en Brajlan Libroservon, kiu eldonis kaj distribuis librojn de pli ol 5 000 titoloj kun 2.5 milionoj da ekzempleroj por blinduloj. Tiuj libroj kun formato relative granda estas binditaj iom loze. Brajla eldono de romano kun milionoj da

vortoj konsistas el 20 volumoj. Tial, la produktokosto de brajla libro estas multe pli alta ol la ordinara, eĉ 10-oble. Kvankam la prezo de brajlaj libroj estas nur 20%-30% de la kosto de papero, tamen ĝi estas tro alta por multaj blinduloj, kaj la libroservo ĉiujare devas kovri la deficiton de 500 mil juanoj.

Vicdirektoro de la Brajla Libroservo s-ro Li Weihong estas blindulo kaj bone komprenas, ke la blinduloj deziras legi librojn, tamen por ili la prezo estas tro alta. Pensante pri tio, li ofte ĉagreniĝis.

Tiam la fakto estis, ke legemuloj ne havas sufiĉan monon por aĉeti librojn, dum la libroservo malfacile vendas la librojn pro la alta prezo. Direktoro de la libroservo s-ro Song Jianmin (Song Ĝjanmin) post longa cerbumado proponis “Prunti librojn anstataŭ vendi ilin” — legantoj pagu certan kaŭcion kaj kontraktu kun la libroservo, utiligante la favoran politikon de la ŝtato, t.e. senpagan poŝtadon de brajlaj presaĵoj por establi tutlandan prunt-reton de brajlaj eldonaĵoj.

Julie de 1994 la propono de Song Jianmin realiĝis. De tiam la blinduloj havas sian propran bibliotekon. En unu jaro, al la biblioteko kolektiĝis mil legantoj, kiuj pagis po 200 juanojn kiel kaŭcion kaj rajtas dumvive prunti ĉiujn librojn eldonitajn de la Brajla Libro-

servo. La decido de la biblioteko estis aprobita de la socio. Antaŭ nelonge iu entrepreno subvenciis pli ol 200 lernantojn de Blindulaj Lernejoj, por ke ili partoprenu la prunt-reton. Kompreneble pli multaj blinduloj mem pagis la kaŭcion, ĉar ili rigardas tion inda. Blindulo el Interna Mongolio diris: “Ĉiun libron mi volas legi, sed ne povas ĉiun aĉeti. Tiu metodo servigas libron al pli multaj homoj!” Gojas ankaŭ la blindaj geknaboj, kiuj lernas en ordinara elementa lernejo. Kvankam aliaj geknaboj multe helpas ilin, tamen oni ne povas liveri al ili sufiĉe da brajlaj libroj. La biblioteko kontentigas la blindajn lernantojn.

Post fondiĝo de la biblioteko, la libroservo ne plu devas eldoni multe da libroj, dank’ al tio oni multe ŝparas. Krome, la kaŭcio pagita de la legantoj donas al la libroservo sumon da cirkula kapitalo, per kio ĝi povas eldoni famajn verkojn. Sole en la pasinta jaro, la libroservo eldonis “Ruĝdoma Sonĝo”, “Tri Regno”, “Milito kaj Paco”, “Jane Eyre” ktp. Iu blinda leganto admiris: “En la mondo ekzistas tiel bonaj libroj. Ŝajnas al mi, kvazaŭ mi vidas lumon.”

Pri la estonteco, direktoro Song diris: “En 1996 aŭ 1997 ni konstruos en Pekino modernan brajlan bibliotekon kun 400 mil ekzempleroj da libroj.”

Certe tio estas feliĉo por la 7.55 milionoj da blinduloj en Ĉinio. ■

Familioj en profundo de dezerto

SUR la mapo de Ĉinio videblas, ke Tarim-baseno en la dezerto Taklimakan kun areo de 320 000 kvadrataj kilometroj estas fora kaj sterila. Ĉu tie loĝas homoj? Kiel ili vivas?

Mi plurfoje vizitis la lokon kaj ĉio en ĝi donis al mi profundan impreson. En Tarim loĝas ĉefe uĝuroj, taĝikoj, kirgizoj kaj aliaj nacimalplimultanoj de Ĉinio. 10 jarojn antaŭe, 257 000 el la 353 700 malriĉaj familioj de Xinjiang (Ŝingĵiang) loĝis en la 4 distriktoj de Tarim, plej postigintaj en Xinjiang. En la lastaj jaroj la helpado de la ŝtato al la regiono kaj rapida ekonomia disvolvigo de la tuta lando pli alte levis la entuziasmon de diversnaciaj loĝantoj de Tarim por konstruado. Lastatempe mi vizitis pli ol 30 kamparanajn kaj paŝtistajn familiojn en dekoj da vilaĝoj de la loko kaj trovis, ke granda ŝanĝigo okazis en ĝi.

ŜANĜIGO DE VESTADO

“Ĉu vi estis vestita per *ĉjapan-o*?” mi demandis survoje plurajn uĝurajn junulojn. Unue ili konfuziĝis kaj poste ridetante kapneis.

Fakte, tio ne devus esti demando. Antaŭ la 80-aj jaroj preskaŭ ĉiuj uĝuraj kaj taĝikaj viroj de Tarim tutjare portis *ĉjapan-on*, robon sen kolumo kaj butonoj, ligitan per tola rubando ĉe la talio.

En la urbo Aksu mi gastis ĉe uĝura kamparano Reheman. Parolante pri *ĉjapan-o*, lia edzino traserĉadis ĉiujn ŝrankojn, sed ne trovis ĝin. Reheman diris al mi, ke li kaj lia unua filo portas vintre eŭropan veston aŭ palton el drapo, la plej popularajn en Tarim, lia dua filo kutime portas brunan ledjakon kaj la tria preferas *ĝinz-on*. La 4 viroj de la familio ĉiuj portas kaskedon en malvarmaj tagoj kaj flordeseĝnan ĉapon en la aliaj tagoj.

“Antaŭe la virinoj devis vuali la vizaĝon eksterdome kaj la viroj portis blankan turbanon longan je kelkaj metroj dum la tuta jaro. Tio perdis multan tempon kaj malhelpis en laboro,” diris Reheman. “Nuntempe nur malmulte da maljunuloj kaj mezaĝuloj kaj la imamoj estas vestitaj tiamaniere.”

Komence de la 80-aj jaroj oni povis vidi ĉie en

Tarim, ke lokanoj iras al foiro kun ŝuoj surŝultre. Havante malfacilon por aĉeti ŝuojn pro malriĉeco, ili devis kunligi la ŝulaĉojn kaj porti la ŝuojn sur ŝultro. Atinginte la foirejon, ili surmetis la ŝuojn kaj vizitinte la foiron, ili denove piediris al la hejmo.

“Ĉu oni ankoraŭ tiel faras?” Je mia demando ekridis la tuta familio de Reheman. Lia edzino diris: “Antaŭe ĉiuj estis malriĉaj. En la lastaj jaroj estis facile perlabori monon. Se diligente labori surkampe aŭ bredi unu ŝafon plie, tio sufiĉas por aĉeti ŝuojn al la tuta familio por unu jaro. Kiu ankoraŭ volas tiel fari?!”

RIĈAJ MANGAĴOJ

En historiaj libroj de multaj gubernioj kaj urboj de Tarim legiĝas la popoldiro: “Sovaĝaj fruktoj servas kiel duonjara nutraĵo, lokanoj ege ĉagreniĝas pri la filoj malsataj.” Tion mi vere komprenis, aŭdinte la parolon de maljuna kamparano Semeti.

Tiutage ni iris sur neĝkovrita vojo por gastigi ĉe Semeti laŭ la invito. Sur la vojo li torente parolis al mi pri la vivo de sia familio. La maljunulo diris: “Maiza faruno kaj tritika brano sufiĉis apenaŭ por duonjaro kaj sovaĝaj fruktoj servis al ni kiel nutro dum longa tempo.” Li rememoris, ke aprile, kiam abrikotoj ankoraŭ ne maturiĝis, la samvilaĝanoj kolektis kaj kuiris ilin kun maiza faruno. Sen legomoj kaj viando oni ne povis sate manĝi kaj ĉiujare multaj vilaĝanoj suferis de favo.” “Sed nun, oni kulturis morusojn, abrikotojn kaj juglandojn laŭ kontrakto kaj ne plu prenas ilin kiel ĉefan nutraĵon, por ne paroli pri sovaĝaj fruktoj.” Laŭ la ĝisdata statistiko, ĉ. 80% de la pli ol 7.5 milionoj da loĝantoj en Tarim fundamente solvis la problemon de manĝaĵoj kaj vestoj.

Kiam ni eniris la hejmon de Semeti, la afabla mastrino tuj prezentis al ni pladojn da fruktoj, kiaj Hami-melono, akvomelono, bananoj kaj mandarinoj. Semeti ripetfoje diris: “Kvankam la fruktoj de Tarim estas multspecaj kaj bongustaj, tamen ili ne sufiĉas por esprimi nian senton al la gastoj malproksimaj.”

Momenton poste, Semeti kaj lia filo kune endomiĝis grasan ŝafon. Ili petis laŭ la loka moro, ke mi palpu ĝian kapon, antaŭ ol ili buĉos ĝin. Je tio, tirante la brakojn de Semeti, mi diris foje-refoje: “Ne, ne...!” Grasa ŝafo kosta pli ol 500 juanojn, tio ne estas malgranda monsumo por kamparana familio.

Semeti komprenis min kaj diris: “Ĉi-jare mi enspezis pli ol 200 000 juanojn nur per vendo de kotono. Unu ŝafo ja ne gravas!” Mi diris, ke ni ne povos tute formanĝi ĝin. Montrante angulon de la ĉambro, li ridetis: “Jen la fridujo!”

Tiele oni regalis nin per bongustaj ŝafaĵo, fiŝaĵo, salikokaĵo k.a.

PLIBONIĜO DE LOĜKONDIĈOJ

Jen la gastaĉambro de la familio de uĝuro Saulo. En la laktoblankaj ŝrankoj lokiĝis diversaj metiartaĵoj, staris ĉe muroj altaapogilaj sofoj por pli ol 20 homoj,

kaj estis fruktoj kaj kukoj sur 4 larĝaj lakitaj tabletoj. La fenestro- kaj pordo-kurtenoj el flava veluro bonorde pendis kaj sur la fenestrobreto estis metitaj kelkaj vazoj da eŭpatorioj. La elektra radiatoro varmigis la gastoĉambrojn kun areo de pli ol 30 kvadrataj metroj.

Saulo diris al mi: “Hanoj ne kutimas sidi sur terlito kun kruroj kruciĝintaj. Nun iuj familioj havas 2 gastoĉambrojn, unu por nacimalplimultanoj kaj la alia por hanoj.”

Elirinte el la gastoĉambro kaj transpasinte la bele desegnititan koridoron kaj la ĝardenon laŭ la cementita vojo, ni forlasis la loĝejon de Saulo kaj tuj iris en sablon ĝis la pieddorsoj. Subite, ni konsciis, ke ni estas en angulo de la dezerto Taklimakan.

La vilaĝo, kie loĝas Saulo, apartenas al Awat-gubernio. Antaŭe la loko estis alkala dezerto. En 1963 venis en la lokon la unuaj ekspluatantoj, kiuj plejparte loĝis en subterajoj por ŝirmi sin kontraŭ sabloventego kaj varmeĝo. En la lastaj 10 jaroj, dank’ al grandarea plantado de kotonujoj kaj disvolviĝo de diversaj entreprenoj, la vilaĝo fariĝis la unua riĉiĝinto en la gubernio kaj ĝia pokapa enspezo kreskis de dekoj da juanoj al 5 000 juanoj pasintjare. Nuntempe 77 el la 97 familioj de la vilaĝo konstruis novajn domojn kun akvoprovizo. Pli ol 90% de tiuj familioj havas motorciklon, koloran televidilon kaj aliajn elektrajn aparatojn.

La dezerta loko konsistigas pli ol 90% de la totala areo de Tarim-baseno, kie tutjare regas sekeco. De longe la tieaj kamparanoj loĝas en domoj kun muroj el adoboj kaj heĝoj, tegmento el arbobranĉoj kaj tigoj kovritaj de tavolo da tero. Ili diris: “Tiuj domoj estas simplaj kaj malmultekostaj, sed en ili estas malvarme en vintro kaj varmege en somero. Ili povas ŝirmi nek de sablo nek de vento. Sablo endomiĝas tra ĉiuj fendoj de la muroj.”

En la lastaj jaroj, dank’ al la rapida disvolviĝo de industrio kaj agrikulturo en Tarim, la kamparanoj kaj paŝtistoj, kiuj la unuaj elturniĝis el malriĉeco, sinsekve transloĝiĝis en domojn el brikoj.

En la malriĉa gubernio Markit pli ol 2 000 kampar-

Ujguraj knabinoj en prezentado



anaj familioj enloĝiĝis en novaj domoj pasintjare. En Tuohula-vilaĝo vivas ĉ. 1 700 familioj. La plejparto de ili loĝas en novaj domoj el brikoj, 1 380 familioj havas nepoluantan necesejon kaj 1 016 — domon kun apartigitaj kuirejo, necesejo kaj stalo.

DE BRUTOJ AL MAŜINOJ

“Nun preskaŭ ĉiu familio kulturas laŭ kontrakto kelkajn hektarojn da kampoj kaj ne sufiĉas al ĝi nur azenoj kaj ĉevaloj,” diris al mi kamparano Memeti Yiming, kiu estis aĉetanta traktoron en magazeno de Shaya-gubernio. Pasintjare ĉiuj liaj familianoj pene laboris tutjare sur 20 hektaroj da kotonkampoj, sed ili ne ricevis ĝojigan rikolton, ĉar ili ne uzis agrikulturajn maŝinojn.

Fakte, Memeti tre postigis kompare kun multaj samvilaĝanoj. Jam kelkajn jarojn antaŭe, maljuna kamparano Semeti forlasis la rajdvipon, kiu akompanis lin dum pli ol 50 jaroj. Nun li aĉetis 3 buldozojn kaj 3 grandajn traktorojn kun remorkoj. En Awat-gubernio estas uzataj pli ol 5 000 traktoroj. La specialiĝinta familio de Wang Guoze en Aksu kulturas laŭ kontrakto pli ol 650 hektarojn da kampoj kaj kontraŭ pli ol 2 milionoj da juanoj aĉetis agrikulturajn maŝinojn.

Dum la vojaĝo mi malofte vidis ujgurajn virojn rajdantaj sur azeno. Aŭtoj, traktoroj kaj motorcikloj rapide anstataŭis azenojn, ĉevalojn kaj kamelojn, kiuj, 10 jarojn antaŭe, servis kiel ĉefaj trafikiloj por kamparanoj kaj paŝtistoj de Tarim. En Tuohula-vilaĝo de Wensu-gubernio loĝas 1 700 familioj, sed funkcias tie pli ol 2 700 motorcikloj.

Antaŭ la domego de la registaro de Tuoyibaoledi-distrikto staris vico da palisoj por ligi ĉevalojn en la pasinteco, sed nun tie estas parko. En la domego okazis kunveno kun partopreno de pli ol 30 vilaĝaj respondeculoj kaj ekster ĝi staris preskaŭ samkvantaj motorcikloj. La estro de la distrikto diris al mi: “Hodiaŭ junuloj kaj mezaĝuloj veturas al urbo ekskluzive per motorciklo.” ■

La somera tendumo en la monto Koko

8 0 geknaboj, metinte ĉe la buŝo siajn manojn en formo de trumpeto, imitis kokerikadon, ĝis ili ne povis deteni sin de rido. Jen komenciĝis la somera tendumo en la monto Koko.

La monto Koko meze de Ĉinio ricevis la nomon pro sia formo de krianta koko. Ĉi-somere regis tie granda vigleco, ĉar la geknaboj partoprenis en kreado de la naturo.

La somera tendumo en la monto Koko estas la unua bazo, starigita de Ĉinio speciale por la mano-en-mana aktivado de urbaj kaj kamparaj geknaboj, kaj ankaŭ la unua somera tendumo por la kamparaj geknaboj. Estonte ĝi senpage servos al ili ĉiusomere.

Kvankam tiuj 80 ĉ. dekjaraj geknaboj el urboj kaj kamparo de Ĉinio plejparte renkontiĝis unuafoje, tamen ili estis malnovaj leter-amikoj. La mano-en-mana aktivado komenciĝis antaŭ 5 jaroj kun la temo: La urbaj kaj kamparaj geknaboj mano-en-mane helpu tiujn, kiuj ne povas plu viziti lernejon pro malriĉeco. Dank' al tiu aktivado, la geknaboj komprenas, helpas kaj prizorgas unu alian. Pro tio ĝi estas tre ŝatata de ili kaj disvastigata en diversaj lokoj de Ĉinio. Diversnaciaj geknaboj, ĉu urbaj, ĉu kamparaj, ĉu sanaj, ĉu kriplaj, helpas unu alian en la aktivado.

EN LA NATURO

Unu el la organizantoj de la somera tendumo en la monto Koko estas respondeculino de la rubriko "Intima Fratino" de la gazeto "Ĉinaj Geknaboj". La partoprenantoj de la somera tendumo nomas ŝin Intima Fratino. En la unua tago post la inaŭguriĝo de la somera tendumo, ŝi kondukis la geknabojn al la birdo-insulo en Nanwan-lago por konversacii kun birdoj. Survoje ŝi diris: "Ne malkvietigu la birdo-regnon, sed amikiĝu kun birdoj kaj parolu tie nur la birdolingvon."

Onklo, kiu bone sciis la "birdo-lingvon", intime parolis kun malgranda birdo. Li diris: "La geknaboj venis viziti vin, bonvolu kolekti viajn amikojn." Ĝi gaje forflugis kaj revenis kun siaj kunuloj. La onklo do reciprokis kantojn kun birdoj. Li tre lertis kanti en la "birdo-lingvo", tiuj malgrandaj birdoj ne estis konvinkitaj kaj ankoraŭfoje venigis aron da birdoj. Tiel la geknaboj ĝoje ĝuis agrablajn kantojn de la birdoj. Rigardante tiujn amindajn estaĵojn, la geknaboj pensis en si, kiel bonaj amikoj estas birdoj kaj homoj.

Kelkfoje oni eĉ sentis tristecon pro amikeco. Informiĝinte pri renkontiĝo kun la pekina amiko Liu

Xuanming (Liŭ Ŝjŭanming), Ping Fang el la kamparo de Hebei-provinco kaptis paron da sciuroj en monto kaj faris por ili orelingojn el ruĝaj lanfadenoj. Tiu donaco ege ravis Xuanming kaj ankaŭ aliajn geknabojn. Subite, iu el ili diris: "En kaĝo la sciuroj ne havas liberon kaj certe malĝojas." Aŭdinte tion, Ping Fang ekgapis. Antaŭe, kiam li kaptis sciurojn, li certe liberigis ilin post kelktaga kunvivado kun ili. Sed ĉi-foje ne. Kiel ilin ŝatis Xuanming! "Lasu ilin! Kiel ni geknaboj, kiu volas vivi en kaĝo?" diris alia. "En la monto Koko prosperas densa arbaro, la ideala hejmo de la sciuroj." Oni varme diskutis pri tio kaj venigis Onklon Xu, respondeculon de la naturparko de la monto Koko. Li diris, ke tion decidu la mastroj de la sciuroj. La 2 knaboj silentis. La Intima Fratino proponis: "Ni petu nian fotisto-onklon foti nin kaj la malgrandajn sciurojn kune, ĉu bone?" Xuanming klinis la kapon kaj kapjesis post momento. Ankaŭ Ping Fang kapjesis, pensante: "Xuanming kaj la sciuroj ĉiuj estas miaj bonaj amikoj. Mi ne devas ĝojigi iun kaj malĝojigi la alian." Tamen larmoj inundis liajn okulojn.

FARI GRAVAN AFERON

Transpasinte rizkampojn kaj lotuslagetojn, la geknaboj venis al la Wangdawan-a Elementa Lernejo.

Ĝi ne estas lernejo ordinara, sed konstruita per ilia poŝmono por la geknaboj en malriĉa regiono. Ĉinaj geknaboj jam starigis 4 tiajn lernejojn. Hodiaŭ, ili venis al la Wangdawan-a Elementa Lernejo kun la celo konstrui ponton por ĝi. Ili diris: "Ni ne lasos plu la kamaradojn travadi la riveron por viziti la lernejon." La geknaboj el Nankino alportis monon kolektitan de ili por konstrui la ponton.

Kvankam ili ĉiuj tutkorpe ŝvitis, fosante kaj transportante teron en la temperaturo de 40°C por konstrui la ponton, tamen ili fieris, ke ili, kvankam junaj, povas fari gravan aferon.

La geknaboj de Wangdawan regalis ilin hejme per tagmanĝo. Zhang Xiaoyun gastis, kompreneble, ĉe Ye Feng, ĉar ili estis mano-en-manaj geamikoj.

Dank' al la Intima Fratino, Ye Feng, kiu iam ne povis plu daŭrigi sian lernadon, denove vizitis la lernejon kaj funkciis kiel monitoro. Xiaoyun rimarkis, ke Ye Feng regalis ŝin per akvomelono, sed li mem ne manĝis. Li kolektis la akvomelonajn ŝelpecojn kaj nutris anasojn per ili. La patrino de Ye Feng faris por Xiaoyun tolsuojn. Ŝi diris: "Stratoj en la urbo estas

cementitaj, do estas komforte porti tolŝuojn.”

Je la unua renkontiĝo kun ŝi Xiaoyun diris: “Saluton, onklino!” Sed je la adiaŭo ŝi diris: “Ĝis revido, panjo!”

BRAVAJ KAMPARAJ GEKNABOJ

Unuafoje sidante antaŭ komputoro, Xu Xiaomin (Ŝju Ŝjaŭmin) estis iom streĉita kaj singena, timante mispremi klavojn kaj ne scipovi manipuli ĝin. Kiel diris la Intima Fratino, oni devas diri “Mi kapablas” antaŭ malfaciloj kaj tiu animstato kondukos al sukceso. Xiaomin sukcesis tajpi per la komputoro la vortojn “La monto Koko kaj mano en mano”. En la konkurso ŝi gajnis premion. Jen ŝi bone komprenis: “Tion, kion povas urbaj geknaboj, kapablas ankaŭ la kamparaj.”

Kvankam la urbaj geknaboj vivas en bonaj kondiĉoj, tamen ili ne estas tiel kapablaj en la vivo kiel tiuj en kamparo. La amikino de Xiaomin ne estas tiel lerta lavi vestojn, je tio Xiaomin diris: “Mi helpu vin.” Tiu kampara knabino scipovas fari multajn laborojn. Iun tagon venis ilia vico loĝi en tendaro, sed oni ne donis al Shanshan faldeblan liton. Je tio Xiaomin diris al ŝi: “Ni ambaŭ kuŝu kune sur mia lito.” Shanshan profunde dormis kaj ŝi rimarkis vekiginte, ke Xiaomin silente sidis... Tio ege kortuŝis Shanshan.

MULTAJ EL ILI PLORIS

En la tago, kiam ili restis en Wangdawan, la tieaj geknaboj gastigis siajn amikojn hejme, sed Chen Hua perdis la sian. Pro tio ŝi ploris. La Intima Fratino konsolis ŝin: “Trankviliĝu kaj ni serĉu por vi.” “Jus li estis...” Kaj ŝi denove ridis post trovo de la amiko.

Xu Hongjie (Ŝju Hongĝje) ploris pro tio, ke lia nova amiko malsaniĝis. “Onklo raportisto, kial vi ne sciigis al mi, ke vi malsaniĝis?” La onklo forte brakumis tiun maldikan knabeton el malriĉa kamparana

familio de Wumeng-montaro...

“Sinjoro Xu Hongjie, vi estas famulo de nia somera tendumo, bonvolu rakonti pri viaj travivaĵoj,” diris la Intima Fratino en la fermo de la tendumo. Xu Hongjie famiĝis ne nur pro tio, ke li estas juna frato de tiu, kiu savis alian kaj oferis sian vivon, sed ankaŭ pro tio, ke li ĉiam zorgis pri aliaj. En la unua tago post sia alveno al la tendumo, li donis sian novan ĉapon al iu infano de la monto Koko. Oni demandis kial, kaj li respondis, ke tiu infano permane ŝirmis la okulojn kontraŭ sunlumo...

La Intima Fratino nomis la infanon Sinjoro Xu kun la intenco ĝojigi ĉiujn geknabojn. Kaj efektive, la geknaboj ridis, sed ili ŝlisis la ridon sur la vizaĝo, aŭskultante la poemon verkitan de la Intima Fratino en la vespera amuzkunveno. Pensante pri la adiaŭo, la geknaboj ploris. Kaj la raportisto el televida stacio tuj filmis tiun emocian scenon. “Ni ne ploru, ni ridu!” iu laŭte diris. Je tio ĉiuj ekridis kaj ridadis ekster la domo, en la arbaro... sed poste ili denove ekploris.

La monto Koko ege ĉarmis en matena nebulo kaj inter la prosperantaj herboj buntaj floroj briletis kiel steloj. La geknaboj estis frustrantaj:

“Venu al Pekino en la Printempa Festo, mi instruos al vi sketadon.”

“Venu al ni, en nia kamparo regas plena vicleco en la Printempa Festo.”

“Ni aŭskultu tiun, kiu gajnos pli bonajn poentojn en la ekzamenoj.”

“Bone, konsentite!” ĉiuj diris unuvoĉe.

“Post hejmenreveno mi sendos al vi postlecionajn legaĵojn kaj gazetojn por geknaboj,” promesis geknaboj el urbo.

“Frue ellitiĝu estonte!” ŝerce diris geknaboj el kamparo. ■

Kolektado de vegetalaj specimenoj



Manipulado de komputoro



Masaĝo en la ĉiutaga vivo (VIII)

KONTRAŬ KRONIKA LUMB- KAJ GAMB-DOLOROJ

La nomitaj doloroj inkluzivas psoasan difektiĝon, patologian ŝanĝiĝon de lumbaj vertebroj, neordiĝon de lumb-vertebraj artikoj, elstariĝon de intervertebra disko kaj iskiatalgion.

La masaĝato kuŝu surventre kaj vi, masaĝanto, staru maldekstre de la masaĝato kaj masaĝu laŭ jenaj manieroj:

(1) Frotu la dorson, lumbojn kaj gluteojn de la malsanulo kaj ruligu vian pugnon sur ili ĝis varmiĝo.

(2) Per via manradiko knedu la sakrospinajn muskolojn de supre malsupren 5-10 fojojn. Per via manradiko aŭ pugno premu ilin 3 fojojn. Per via dikfingro aŭ kubuto forte premu ĉiujn akupunkturajn punktojn montritajn en Bildo 1. Per via manradiko knedu la sakrospinajn muskolojn 3-5 fojojn. Per via manplato frotu la akupunkturajn punktojn laŭ la linio montrita en Bildo 1 de supre malsupren 3-5 fojojn.

(3) Per via manradiko aŭ pugno prem-knedu la maldekstran gluteon, por ke la muskoloj de la gluteo estu malstreĉitaj. Metu viajn dikfingrojn unu sur la alian kaj per ili premu la akupunkturajn punktojn *hŭantjaŭ*.

(4) Per viaj dikfingro aŭ du dikfingroj premu la akupunkturajn punktojn *ĉengfu*, *jinmen*, *uejĝong*, *ĉengŝan*, *kunlun*, *ŝenmaj* kaj *ĝinmen* po 5-10 sekundojn, ĝis doloretigo de la premitaj korpopartoj.

(5) Per viaj manoj kaptu la muskolojn de la malantaŭa parto de la malsupraj membroj. Faru tion malrapide de la ingveno ĝis la maleolo 3 fojojn. Premu la muskolojn de la malantaŭa parto de la gamboj 3 fojojn.

(6) Staru dekstre de la malsanulo kaj ripetu la masaĝon montritan en (3), (4) kaj (5).

(7) La masaĝato sidu aŭ kuŝu surdorse kaj vi staru dekstre de li. Metu unu manon sur liajn krurojn kaj la alian sur liajn genuojn. La malsanulo kunigu la krurojn, fleksu la genuojn, por ke la genuoj laŭeble premu sin al la brusto (Bildo 2). Ŝancelu la malsuprajn membrojn de la malsanulo por malstreĉi liajn lumbojn.

(8) La masaĝato malstreĉu la maldekstran kruron kaj ĝin rektigu. Vi tenu la dekstran maleolon de la malsanulo per unu mano kaj tenu ties genuon per la alia. Fleksu ties genuon kaj gambon kaj per la mano, per kiu vi tenas la maleolon, rapide etendu ties kruron ĝis rektiĝo (Bildo 3). Faru tion 3-5 fojojn. Faru la samon al la maldekstra kruro.

KONTRAŬ TORDIĜO DE LA MALEOLOJ

Maleola tordiĝo estas ofta malsano. Ĉi tie ni traktas pri kuraco de maleola tordiĝo sen osta rompiĝo. La metodoj estas uzataj ankaŭ por kuraci la malnovan tordiĝon. Koncerne la akutan tordiĝon de la maleoloj, kiu kaŭzas akran doloron, ŝveliĝon kaj malfacilan moviĝon al la

koncerna korpoparto, estas do malpermesite masaĝi por neprofesiaj kuracistoj. Tiam oni devas senprokraste fari malvarman kompresadon kaj bandaĝadon al la malsanulo suferanta de akuta tordiĝo.

La masaĝato kuŝu surdorse kaj vi staru antaŭ liaj piedoj.

(1) Per la palpa flanko de la fingroj malforte frotu la vunditan parton 30-50 fojojn kaj per la dikfingro forte knedu la lokon 30-50 fojojn ĝis varmiĝo.

(2) Puŝu viajn unu aŭ du dikfingrojn sur la vundita loko de la maleolo de malsupre supren 10 fojojn.


(3) Per unu mano tenu la piedfingrojn de la malsanulo kaj per la alia ties kalkanon. Malforte tiru ĝin malsupren kaj ŝancelu ĝin (Bildo 4).

(4) Per la palpa flanko de la montra fingro premu la akupunkturajn punktojn *ŝangĉiŭ*, *ĝongfeng*, *ŝeŝji*, *kunlun*, *ŝenmaj*, *ĉiŭŝju*, *pusan*, *ĝinmen*, *ĝinggu* kaj *ŝugu* (Bildo 5), per la palpa flanko de la montra fingro knedu tiujn punktojn kaj per la pinto de la dikfingro piku ilin forte, tamen ne vundu la haŭton.

(5) Per la manplatoj premu ĉiun maleolon 30 sekundojn.


(6) Metu viajn manplatojn sur la internan kaj eksteran maleolojn kaj puŝu ilin de malsupre supren 10 fojojn.

Se la tordiĝo estas malnova kaj maleolo iomete ŝvela, vi do povas per la pinto de la dikfingro piki la ŝvelintan korpoparton kaj per la dikfingro forte premi la lokon, tio estas efika por senŝveliĝo kaj sendoloriĝo. ■



Amo de maljunuloj

de ZHANG QINGZHEN



Gemaljunuloj refoje geedziĝintaj

NUN en la ĉinaj urboj pli kaj pli multiĝas maljunuloj. Ili sin ekzercas en parkoj, promenas kaj ludas ĉinan ŝakon ĉe stratoj...

Ni prenu Pekinon kiel ekzemplon. En Pekino vivas 1.2 milionoj da maljunuloj pli-ol-60-jaraj, el kiuj 1/3 estas vidvoj. Simila fenomeno videblas ankaŭ en aliaj urboj. Timante solecon, iuj maljunuloj volas havi kunulon. Tamen, geedziĝi por gemaljunuloj ne estas tiel facile kiel por gejunuloj.

Emerita s-ro Ma, kiu loĝas en la Orienta Distrikto de Pekino, estis tre okupita lastatempe. Li kaj liaj maljunaj kamaradoj dekoris la ĉambrojn kaj aĉetis meblojn. Li preparis sin por sia nupto.

Oni demandis lin, kiu estas lia svatinto. Li kun rideto respondis: "Ni interkonatiĝis en distrado."

Li estas malkaŝema, spektema kaj iafaje sin amuzas per kantado de pekin-opero. Emeritiĝinte en la lasta jaro, li kaj liaj kamaradoj multfoje dancis la nacian *janggedancon* kaj konatiĝis kun 50-jara Zhang Shuzhen (Ĝang Ŝuĝen). Ili enamiĝis unu al la alia post nelonge. S-ro Ma diris: "Kiam mi estis juna, mia edziĝo estis decidita kaj aranĝita de miaj gepatroj. Mi tute ne sciis, kia estas mia edzino, antaŭ ol eniri la novgeedzan ĉambron. Post geedziĝo iafaje okazis konfliktoj inter ni. Poste ŝi mortis kaj la familio lamiĝis. Kiam mi vidis gejunulojn arde amantajn unu la alian, mi pensis en mi, ke tia feliĉo neniam benos min en mia vivo. Neatendite, en la maljuneco mi enamiĝis tute laŭ mia propra volo."

Refoja geedziĝo de maljunuloj estas neriproĉinda, tio estas ilia rajto. Refoje geedziĝintaj gemaljunuloj ne plu sentas solecon, ili

flegas unu la alian kaj kune vivas la feliĉan vivon. Samtempe, tio ankaŭ malpezigas la ŝarĝon de iliaj parencoj kaj eĉ de la socio kaj estas utila por liberigi laborfortojn de la familio kaj la socio. Tamen, longtempe influate de la feŭdisma penso, oni estas katenita de la tradicia koncepto kaj ne ĉiu refoja geedziĝo de gemaljunuloj iras tiel glate, kiel tiu de s-ro Ma.

S-ino Li, pli-ol-50-jara, kies edzo mortis antaŭ dek jaroj, devis vivteni siajn gefilojn. Laŭ mi, por tiel teneraj profesiulinoj, kia ŝi, ne estas malfacile trovi deziratan amaton. Sed, katenite de la tradicia etiko, ke por virino ne decas edziniĝi dufoje, ŝi ne pensis pri refoja edziniĝo, sed dediĉis tutan energion al siaj gefiloj. Ŝi kaj laboris kaj flegis la gefilojn.

Kun tempopaso ŝiaj gefiloj plenkreskis kaj ĉiu el ili jam fondis familion. Ŝiaj haroj ĉe la tempoj nerimarkite griziĝis kaj ŝi

emeritiĝis. Poste ŝi sentis neelteneblan solecon. Kiam ŝi vidis maljunajn parojn, kiuj promenis surstrate mano en mano aŭ ŝultro ĉe ŝultro, ŝin atakis neesprimebla soleco.

La zorgema filino rimarkis la solecon kaj animan turmenton de la patrino kaj intencis admoni al ŝi refoje edziniĝi, sed ne kuraĝis diri tion. Por spici ŝian vivon ŝiaj gefiloj aĉetis por ŝi amindan katon. De tiam la kato estis "kunulo" nemankigebla por ŝi. Sed kun tempopaso ŝin denove tedis la vivo.

La socio senĉese progresis kaj pli kaj pli multaj maljunuloj refoje geedziĝis. Tio ankaŭ ekscitis s-inon Li: "Kial mi tiel turmentas min mem?! Mi devas rearanĝi mian vivon." Ŝi do elverŝis la koron al la gefiloj, tiuj ĉi aprobis ŝin. Ili deziris, ke ilia patrino havu feliĉan vivon en la maljuneco. Oni svatis ŝin kaj ŝi edziniĝis al emerita inĝeniero.

Iuj opinias, ke amo okazas nur inter gejunuloj kaj refoja geedziĝo de maljunuloj celas nur kunvivadon. Fakte, la maljunuloj, kiuj iris la zigzagan vojon de sia vivo, plej bone komprenas kaj plej alte taksas la amon. Sekve, la amo de la maljunuloj estas belega, kiel aceraj folioj ruĝiĝintaj post prujno.

Sur kvietata strato de Pekino oni ofte vidas maljunan paron promenanta. Iliaj vangoj ruĝiĝas de la subiranta suno kaj iliaj haroj flirtas en vespera vento. Vidante tion, eĉ junuloj laŭdas ilin foje-refoje.

Ili estas Pu Wenkui, emerita ŝtatoficisto de la Akademio de Sciencoj sub la Fervoja Ministerio de Ĉinio, kaj lia edzino Gao Yuhua. Ili kune vivis jam sep jarojn. La antaŭa edzino de Pu Wenkui forpasis en 1985. Tio forte atakis lin. La gefiloj estis obeemaj al li, tamen ili ĉiuj havis sian laboron. De soleco li malsaniĝis kaj ofte vizitis hospitalon. Liaj kolegoj admonis, ke li reedzi-

ĝu.

Gao Yuhua, kiu loĝis en nordorienta Ĉinio, perdis sian edzon antaŭ multaj jaroj. Ŝi estis malsanema. Por ŝin distri ŝia fratino venigis ŝin al Pekino. La hejmo de la fratino estas proksime de tiu de s-ro Pu. Pere de aliaj ili interkonatiĝis. La sama sorto proksimigis ilin.

Post duonjaro ili geedziĝis. Ili sincere traktas unu la alian, kune faras dommastrumadon kaj interkonsiliĝas pri elspezo. Pli ĝojinde estas, ke la gefiloj de ili ambaŭ vivas harmonie. La maljuna paro ĝuas la feliĉan familian vivon.

Krome, ankaŭ nemalmultaj gemaljunuloj renkontis malfacilaĵon en sia refoja geedziĝo. Ekz. iuj ne povis realigi sian deziron pro malhelpo de siaj gefiloj, iuj geedziĝintoj ĉagreniĝis pro temperamenta konflikto, kaj iuj perdis multon post refoja edziĝo.

Maljunulo Lin perdis sian edzinon antaŭ ok jaroj kaj s-ino Wang vidviniĝis antaŭ kvar jaroj. Ili vivas en la suda kvartalo de la pitoreska urbo Qingdao (Ĉingdaŭ). La maljuna paro havas komunan lingvon kaj similajn travivaĵojn. Ili devus esti feliĉaj, tamen iliaj gefiloj reagis kontraŭ la volo de la gemaljunuloj.

Informiĝinte pri la amo de sia patro, la kvar filoj de s-ro Lin tuj venigis la du filinojn de s-ino Wang por kune interkonsiliĝi pri la reago. Poste ili revenis al sia respektiva hejmo kaj deadmonis sian patron aŭ patrinon forlasi la amon. Ĉar la gemaljunuloj estis firmvolaj, la gefiloj do minacis rompi kun ili. La obstina s-ro Lin persvadis s-inon Wang kaj ili geedziĝis post nelonge.

La gemaljunuloj gajnis feliĉon, sed ili alvizaĝis severan fakton, ke ili perdis siajn gefilojn. Dum du jaroj iliaj gefiloj ne vizitis ilin.

En la reala vivo tia fenomeno estas malofta kaj ankaŭ abomeninda. Sed pli multaj deziras, ke ĉiuj geamantoj fariĝu geedzoj. ■

"Nokta Amuzado de Han Xizai"

Teksto de DONG PEIQIANG


La pentraĵo "Nokta Amuzado de Han Xizai" altas 28.7 cm. kaj longas 335.5 cm. Ĝi estis farita de kortega pentristo Gu Hongzhong (937-975) de la Suda Tang-dinastio (902-979).

Ĝi konsistas el 5 partoj: "Muzikoaprecado", "Dancoaprecado", "Ripozo", "Aŭskultado de flutoludo" kaj "Disiĝo". Ĝi bildigas parton de la nokta amuzado de granda aristokrato Han Xizai (Han Ŝizaj). La kvin partoj estis apartigitaj per faldeblaj ekranoj, tamen interligitaj je la enhavo.

La supra parto estas "Muzikoaprecado". Han Xizai (la dua de dekstre) kaj liaj amikoj estas aŭskultantaj muzikoludon de aktorinoj. La absorbiĝo de la aŭskultantoj estas facile rimarkebla.

La meza estas "Aŭskultado de flutoludo". Han Xizai kun ventumilo ŝajne aŭskultas la ludadon.

La vizaĝoj kaj manoj de la personoj en la pentraĵo estas vivece pentritaj. La apatio kaj melankolio de Han Xizai, malgraŭ ke li sin amuzas, estas senkaŝe esprimitaj en la pentraĵo. Ĝi estas majstra verko en la flanko de homfigura pentrado en la antikva Ĉinio.






Denove rubriko pri la Silka Vojo, sed la Norda

Vi legos ĝin en la unua numero de EPĈ, 1996.

Kiam Cezaro aperis en silka robo, la publikon tuj kaptis admiro kaj envio...

Kiel oni portis la pompan ĉinan silkon en la malproksiman Eŭropon? Se vi havas intereson por koni la historion kaj la nunan staton de la mistera Norda Silka Vojo, legu artikolojn ekde la unua numero de EPĈ, 1996.



ISSN 0032-4361



世界语 《中国报道》 一九九五年第十二期

(本刊代号:二—九一五) 国内统一刊号:CN11 1339/G2